

Bulgara ESPERANTISTO



Redakta Komitato:

Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Vasil BORO
V'NSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro
DENĜEV, Dimitro HAĜIEV, Maria JAN-
KOV', Krâstju KARUCIN, Haim LEVI
Venelin MITEV, Flori NIKOLOV.

Sektretario administranto: **Metodi Garev**
Korektis: **K. Vâlev.**
Sofio, p. k. 66 Tel. 31-00-29

Momentoj el la solena kunveno en Kazan
lâk (vd. paĝon 11—12):

1. La prezidanto St. Koev pendigas la or-
denon „Kiril i Metodî“ sur la verdan flagon.
2. Rigardo al la publiko.



* * *	Antaŭ la nova lernoĵaro	1
* * *	Dua internacia renkontiĝo de ver- kistoj en Sofio	4
D. Mutuŝev.	Intervjuo kun Veselin Da- mjanov.	6
* *	Sukcesaj koncertoj de Maria Ange- lova en Italio	7
Stela kaj Mois Benvenisti.	Emil Ŝeker- gijski ĉiam vivas inter ni	8
R. Konstantinova.	Internacia Jaro de la Infano	10
K. Ivanov.	„Roza Valo“ 75-jara	11
Stefan Sokolov.	Tradicia E-renkontiĝo en Samokov	12
D. Haĝiev.	Tutlanda seminario de la bul- gara MEM-lomitato	13
D. Denĉev.	Hungara vespero en Sofio	12
Luka Vâlĉanov.	Georgi Idakiev 70-jara	14
Inĝ. N. Uzunov.	Celebro de G. Idakiev	14
Ĉeestinto.	Celebro de Violin Oljanov	15
M. Gaidamaniĉiene.	Konatiĝu — „Ju- neco“!	15
I. Vojnov.	Koresponda ŝako	16
L. Grozdanov.	Esperanto kaj „Filaser- dika-79“	17
Inĝ. Panajot Kurdalanov.	Vizitkarto de bona volo	17
L. Jevsejeva.	Patrolando	18
R. Lazarova.	Ringo. Pluvo	18
Usin Kerim.	Monumento	18
R. Konstantinova.	La eta ruĝa albumo	18
V. Hanĉev.	Ringo	25
Rasul Gamzatov.	Gruoj	25
Bulgara popola kanto.	Testamento de bra- vulo.	25
V. Glazunov.	La belulino Ajsulu	25
N. Andrianova.	Trista melodio	29
I. Basko.	Prelego.	30
N. Aleksiev.	Interesa biografia verko	30
F. Nikolov.	Pri la E-gramatiko de V. Oljanov	31
* *	Tra la gazetalo	31
S. M. Simeonov.	Himno de l'infano	III
J. Trifonova.	Infaneco mia	III
* *	Pensoj de eminentaj bulgaroj	III
K. V.	Forpasis Jordan Markov	IV
* *	Deziras korespondi	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Partoprenintoj en la E-renkontiĝo en Sa-
mokov (vd. paĝon 2)



**ANTAŬ LA NOVA LERNOJARO DE ESPERANTO**

La nova lernojaro de Esperanto estas sur la sojlo. Ĉu ni estas pretaj renkonti ĝin?

Ĉiuj distriktaj kaj societaj estraroj jam okupiĝis zorgeme pri tiu gravega tasko. Ili dediĉis al ĝi kunvenojn, plenkursidojn. Senduba kontribuo por la bona solvo de la tasko estas ankaŭ la organizitaj en majo-junio kvin regionaj pedagogiaj konferencoj — en Gorna Orjaĥovica, Rila, Varna, Smoljan (Pisnica) kaj Măgliš, en kiuj partoprenis ĉ. 180 e-istoj. La konferencoj pritraktis la organizan kaj metodikan staton de nia instrulaboro kaj donis utilajn rekomendojn por ĝia plua plibonigo.

Beŝuŝinde tamen ne mankas distriktaj kaj societaj estraroj, kiuj nesufiĉe zorgas pri la instrulaboro. Ili kontentas pri tute modestaj, kelkfoje eĉ nulaj rezultoj sur tiu ĉi decida sektoro de nia asocia agado. Foje la instrulaboro estas lasita al si mem. Ne! Oni devas meti finon al tiu pereiga praktiko! La instrulaboro estas ekskluzive grava kaj ĝi devas esti organizita kiel ĉiu alia. Kaj organizado signifas planadon. Jam en junio ĉiu societa, distrikta kaj sekcia estraro devas ellabori planon por la nova lernojaro. La plano devas esti tute konkreta: kie oni malfermos novajn kursojn, kie oni daŭre klopodos por prepari la grundon por novaj kursoj, kiom kaj kiaj estos la formoj por plua perfektigado de la progresintoj, kiuj estos la kursguidantoj (decidas ties lingva kaj metodika niveloj!), certigo de materiala bazo (konvenaejo, lernolibroj, vortaroj, instruhelpiloj — klasikaj kaj modernaj), fiksi konvenan kursokotizon (ne malpli ol 10 levoj por normala 4-monata kurso — 64 instruhoroj), ĝustigi konkrete kun kiuj aliaj sociorganizaĵoj la estraro kunlaboros — Patrolanda Fronto, Komso-molo, Sindikatoj, turista societo, packomitato, sobrula komitato, popola legejo, kulturdomo ktp. por ke nia E-agado trovu pli vastan socian reton.

Oni jam devas ĉesigi la praktikon organizi nur civitanajn kaj lernejanajn kursojn. Estas tempo direkti la atenton al novaj, ege gravaj terenoj: industriaj entreprenoj, agrikulturaj kompleksoj, oficejoj, sciencesploraj institutoj k. s. — tiel ni pli intime proksimiĝos al la ebleco meti E-on serve al praktikaĵoj celoj, al aktualaj produktad-oficaj kaj sciencesploraj celoj kaj taskoj. La efikeco de E-o kiel lingva rimedo por ĉiaspeca inierŝanĝo de spertoj inter diverslandaj homoj, laborkolektivoj kaj organizaĵoj estas jam delonge elprovita.

En la plano oni devas antaŭvidi la laboron por kreskigo de propraj pedagogiaj kadroj. Nia movado havas egan bezonon pri bone preparitaj lingvoinstruantoj. Ĉiuj estraroj — societaj, distriktaj, sekciaj, Centra — devas kuragigi kaj subteni morale kaj matertale kapablajn, perspektivajn samideanojn, el kiuj povos kreski bonaj E-instruistoj kaj kursguidantoj. Aparte la estraroj devas helpi ilin materiale por partopreni en diversaj kursoj — someraj, vintraj, printempaj, ĉeestaj kaj korespondaj.

Oni devas plani ankaŭ la plan perfektigadon de la e-istoj per duagradaĵoj kursoj, parolantaj rondoj, tradukaj, literaturaj, dramaj kaj aliaj rondetoj kaj samtempe certigi eblecojn por publika manifestado de ties atingoj.

Ekskluzive grava momento en la preparlaboro de la nova lernojaro estas la agitado pri la kursoj, t. e. la reklamo. Ĝi devas esti siatempe, ampleksa, impresanta kaj kompetenta. Ĉi tie la estraroj havas bonan eblecon montri plej grandan inventemon. Oni devas uzi ne nur la plej ofte aplikatajn formojn (afiŝoj, agittabuloj, vitrinoj, sciigoj en la loka ĵurnalo kaj per la urba radioreto). sed oni devas serĉi novajn manierojn de agitado kaj reklamado. Nepre grupetoj el 2—3 e-istoj devas viziti la gvidantojn de lernejoj, entreprenoj, oficejoj, institutoj k. a. por klarigi la celojn kaj taskojn de nia movado, peti permeson renkontiĝi kun la laborkolektivoj ktp. Sed neniam oni forgesu, ke ekskluzive grava kaj plej certa restas la individua agitado. Ĉiu societa membro devas preni sur sin la taskon altiri almenaŭ unu homon al la kursoj. Tiun sindevigon oni devas noti kaj ĝian plenumon siatempe kaj laŭde diskonigi. Konkurado inter la membroj pri varbado estas dezirinda kaj laŭdinda.

Ĉi-jare ekskluzive grandan atenton oni devas doni al la kunlaboro kun la popolaj legejoj kaj kulturdomoj. Jam en n-ro 3/1979 de „Bulgara Esperantisto“ ni aperigis la kontrakton, kiun BEA kaj la Komitato de Kulturo subskribis pri kunagado. La Komitato siaflanke ankaŭ presigis kaj dissendis la kontrakton al la legejoj kaj kulturdomoj en la tuta lando. La kontrakto prezentas ekskluzive favoran bazon por fruktodona kurso agado. Ĉiu estraro devas tuj ankoraŭfoje trastudi kaj maksimume utiligi ĝin. Se en la loĝloko mankas E-societo, iniciaton devas havi ĉiu aparta e-isto. Oni ne devas atendi, ke la legeja estraro serĉu nin. Ni, la e-istoj, estas la iniciatintoj pri la subskribo de la kontrakto, ni vevas esti ankaŭ iniciatintoj de ĝia efektivigo.

Kaj ankoraŭ io tre grava: la malfermo de la nova lernojaro devas okazi per tuturba solena kunveno fine de septembro aŭ komence de oktobro. En la tagordo estu bona, alloga prelego pri E-o, poste artprogramo en bulgara lingvo kaj parte en E-o. La programon partoprenu la plej bonaj amatoroj, ankaŭ artistoj el la loka teatro kaj el Sofio. Oni povas organizi ankaŭ kunvenon-koncerton de artistoj el Sofio (pri tio oni serĉu ankaŭ la helpon de la CE).

Do la anoncado de la kursoj devas esti tia, ke ĝi atingu la tutan loĝantaron de la urbo, de la vilaĝo, la tutan laborkolektivon de entrepreno, oficejo, instituto. Jam ĉe la komenco ĉiu kurso devas esti plensanga, por havi bonan sukceson.

En 1980 jaro en Plovdiv okazos la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj. Prepare al tiu grava evento la Centra Estraro de BEA organizas grandan antaŭkongresan konkuradon. La rezultoj de la instrulaboro estas unu el la indicoj de tiu konkurado. Pri ĝi la CE jam dissendis detalan instrukcion. Ĉiu societa, distrikta kaj sekcia estraro de BEA devas labori tiel, ke ĝi estu honorita kaj premiita dum la nobla antaŭkongresa konkurado. El la laboro gajnos ĝi mem, gajnos la tuta bulgara E-movado, gajnos la patrolando, la internacia amikeco kaj la tutmonda paco!

TRE GRAVA: „BULGARA ESPERANTISTO“ KRESKAS!


Responde al peto de la redakcio la Komitato de Gazetaro aprobis novan formaton de nia gazeto por 1980 j. Do ekde januaro „BE“ kreskos duoble. Tio estas granda sukceso honore al la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj en 1980.

Malgraŭ la grandigo la abonprezo nur modeste plialtiĝas: por Bulgario ĝi estos 2,90 lv., por socialismaj landoj — 5,42 lv., por ĉiuj ceteraj landoj — 5,90 lv.

Ni mobilizu ĉiujn fortojn kaj ekvarbu ekde la unua tago de la abonkampanjo!

30 JAROJ EKDE LA MORTO DE GEORGI DIMITROV

Nia nacio, kvankam malgranda, posedas potencialajn fortojn, kiuj, se suŝtê disvolviĝos — kaj ni estas konvinkitaj, ke ili disvolviĝos, — povas konkuradi kun la plej grandaj nacioj sur la kampo de la kulturo kaj arto.



На 28 май т. г. се състоя пленум на Българския есперантски съюз, който взе решение във връзка с 40-я юбилеен конгрес на българските есперантисти.

РЕШЕНИЕ НА ПЛЕНУМА НА ЦР НА БЕС

40-ят юбилеен конгрес на БЕС да се състои от 12—14 юли 1980 г. в гр. Пловдив.

ДНЕВЕН РЕД НА КОНГРЕСА

1. Отчетен доклад на ЦР за периода след 39-я конгрес.
2. Доклад на контролната комисия на БЕС.
3. Приемане на решения.
4. Изменения и изпълнения в Устава на БЕС.
5. Провъзгласяване на псчетни членове на БЕС.
6. Избиране на ръководни органи на БЕС.

*

В рамките на конгреса да се проведат отчетно-изборни конференции на секциите на БЕС.

НОРМИ ЗА ИЗБИРАНЕ НА ДЕЛЕГАТИ ЗА КОНГРЕСА

Делегатите на конгреса се избират на отчетно-изборните конференции на окръжните ръководства на БЕС. Един делегат се избира на 15 или част от 15 редовно отчетени членове. Под внимание се взема броят на отчетените членове за 1979 или 1980 г., т. е. годината, която е по-благоприятна за отделното дружество.

Конгресът да мине под знака на 1300-годишнината от основаването на българската държава.

В периода на подготовката на конгреса да се разгърне всестранна работа за сживяване, разрастване и укрепване на есперантските дружества в страната, за активизиране и издигане организаторската роля на окръжните ръководства и секциите на БЕС. За тази цел в съюза да се организи а съревнсование между дружествата и секциите, което да се проведе през периода от 1 юни 1979 г. до 30 май 1980 г. Съревнсованието да стане постоянен метод на работа на БЕС и след 40-я конгрес, като се стчита на всеки две години.

GRAVA DISTINGO

La Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris

k-don NIKOLA ALEKSIEV

per la alta titolo „Heroo de la Socialisma Laboro“ pro lia aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj en la konstruado de la socialismo lige kun la 70a datreveno de lia naskiĝo.

Ni gratulas k-don Aleksiev pro la meritita alta distingo!

La sciigo en ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ pri la honorigo de k-do Aleksiev estas akompanita de konciza biografio noto, en kiu oni

aparte mencias la fakton, ke li multjare estis prezidanto de BEA kaj de MEM kaj membro de la Monda Packonsilio.



DUA INTERNACIA RENKONTIĜO DE VERKISTOJ EN SOFIO

En Sofio — la bulgara ĉefurbo, kiu portas la nomon de la universala saĝeco, je la 8—9 de junio okazis dua internacia renkontiĝo de verkistoj. (La unua okazis antaŭ du jaroj). Bulgario, lando kun 1300-jara historio, centro de kulturoj kaj civilizacioj, geografia kaj spirita krucvojo de homoj kaj esperoj, estis fiera mastri kaj praktike organizi tiun gravan internacian kulturan eventon. La renkontiĝon partoprenis pli ol 70 elstaraj verkistoj el Eŭropo, el Usono kaj Kanado, el diversaj kontinentoj.

Ĝia devizo estis: „La paco — espero de nia planedo!“

La renkontiĝon salutis k-doj Todor Jivkov — prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario, Leonid Breĵnev — prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, kaj s-ro Kurt Valdhajm — sekretario de UNO. La partoprenantoj en la renkontiĝo akceptis mesaĝon.

MESAĜO

*de la verkistoj-partoprenantoj en la internacia renkontiĝo en Sofio 1979
al la verkistoj de la estonteco*

Karaj amikoj!

Ĉu ni povas alvoki vin per tia adresvorto, vin — homojn, kiujn ni ne konas, kun kiuj ni certe neniam renkontiĝos, homojn el niaj antaŭsentoj kaj idealoj, homojn de la estonteco?

Jes! Ni rajtas nomi vin tiel — „karaj amikoj“!

Ĉar ni kredas je la estonteco de la homaro. Ĉar ni kredas je vi — la realigontoj de niaj plej aŭdacaj hodiaŭaj revoj. Tiu ĉi kredo lumigas nian spiriton kaj nian verkaron. Ĝi

kunvenigis nin al la internacia verkista renkontiĝo Sofio — 1979, kie la devizo „La paco — espero de la planedo!“ akiras simblon kaj tradician signifon.

Kia estas tiu ĉi jaro — bona aŭ malbona?

1979 jaro estis proklamita de UNO Internacia Jaro de la Infano. Tio estis bona kaj utila decido. La infano estas enkorpiĝo de la homa pureco, simbolo de la estonteco de la homa gento. Tiu ĉi simbolo kaj la penso mem pri la infano vekas en ĉiu honesta koro noblajn strebojn kaj impetojn.



Nature, dum tiu ĉi Jaro de la Infano ankaŭ ni direktas niajn pensojn al vi — la belartaj kreantoj de la estonteco, la konscienco de la estonteco. Sur viaj ŝultroj kuŝos respondecado pri la sorto de la mondo en via XXI jarcento, samkiel hodiaŭ sur niaj ŝultroj pezas historia respondecado pri nia XX jarcento.

Nia jarcento estis glora tempo de renoviĝo kaj liberiĝo, jarcento de epokfaraj sciencaj inventoj, jarcento, kiam la homo venkis la teran graviton kaj ekflugis al la Kosmo.

Sed samtempe nia jarcento, kiu jam subiras, estis tempo de la plej teruraj, pereigaj mondmilitoj. Oni kreis kaj amasigis armilojn povantajn likvidi la homan civilizacion. La signo de la morto povas kovri la pasintcon, la nuntempon kaj la estontcon de la kulturo.

Tial nun, kiam ni devas transdoni al vi per kelkaj ordinaraĵoj homaj vortoj la sanktan stafeton de tio, kion ni ricevis kiel heredaĵon de la generacioj antaŭ ni, plus nian elsuferitan veron, ni antaŭ ĉio ĵurpetas vin ekskludi la militon kiel teorion kaj praktikan rimedon por solvado de la disputaj problemoj de sia tempo. Faru tiel, ke la milito estu por vi — la verkistoj kaj ĝenerale por la artkreatoj de la estonteco, nur historia temo. Enviu al ni pri ĉio, kion vi deziras, krom pri tio, ke la milito estis nia nuntempa temo.

Por nia kaj por ĉiuj sekvantaj generacioj la demando pri la paco kaj milito estas demando pri la ekzisto aŭ pereado de la homaro.

La fakto mem, ke ni adresas nin al vi, karaj amikoj, per tiu ĉi mesaĝo, kredante, ke niaj hodiaŭaj sentoj kaj pensoj atingos vin, montras, ke ĉiuj ni, pli-malpli, posedas historian optimismon.

El ĉiuj teruroj kaj malkonoj, kiujn alportis al ni la militoj, eble la plej kruela estas tiu dividiĝo, tiu disŝirigo, tiu fizika kaj morala detruo de ĉio, kion ili tuŝis. Ni estas infanoj

de dividita kaj kontraŭstarigita homaro kaj ni batalas kontraŭ tio. Vere, estas ankaŭ justaj kaj liberigaj militoj. Sed la kaŭzoj, kiuj provokas militon, restas ĉiam kontraŭhumanaj kaj obskurantismaj. La milito kondukas al rompo de la harmonio de la personeco, de la popoloj kaj la mondo. Ĝi neniigas leĝojn kaj la arton.

Tial nia alvoko al vi estas: ne kontraŭstarigu la verajn homajn valorojn, ne dividu la civilizacion kaj la kulturon de la popoloj je blankaj, flavaj, nigraj aŭ ajnaj antagonismaj kulturoj! Dediĉu vian arton kaj ĉiujn viajn fortojn al restarigo kaj triumfo de la harmonio kaj la ĉiuflanka disvolviĝo de la homa personeco kaj la socio! Fariĝu konstruantoj de pli justa mondo, kiu estos direktata ankaŭ laŭ la leĝoj de la beleco!

Karaj amikoj!

La homaj mesaĝoj ĉiam trovis eblojn atingi sian adresaton. Per la botelo de la ŝippereanto aŭ per la flugiloj de la poŝtkolombo. Ĉizitaj sur roko aŭ skribitaj per sango... Ni elektis konfidi nian mesaĝon al vi pere de la koroj de la posteuloj. Ni enmanigas nian komunan mesaĝon kaj la nedisigeble ligitajn kun ĝi personajn adresiĝojn de la infanoj-partoprenantoj en la Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco“, kiu kunvenos en Sofio — la ĉefurbo de Bulgario — en monato aŭgusto de la Internacia Jaro de la Infano.

La althumana celo de la infanasembleo „Standardo de la Paco“ estas kontribui por vekiĝo de la kreaj ecoj en pli kaj pli da infananimoj. Helpi al infanoj el ĉiuj anguloj de nia planedo renkontiĝi kaj lerni komunikiĝi inter si en la granda, unueca tuthumana lingvo de la beleco kaj la arto.

Karaj amikoj!

Artkreatoj de la estonteco!

Homoj de la estonteco!

Ni kredas al vi!

Tfu ĉi mesaĝo estas malfermita. Ĉiu verkisto el ĉiu lando, kiu aprobas kaj subtenas ĝiajn ideojn kaj ĝian

spiriton, povas aliĝi al ĝi, subskribi kaj disvastigi ĝin.

Bulgario — la lando-dommastro de la verkista renkontiĝo, devigas sin
Sofio, junio 1979

eldoni kaj disvastigi tiun ĉi mesaĝon nun kaj ankaŭ eldoni ĝin en la 2000a jaro kaj en la 2050a jaro. Ni proponas, ke UNO apelaciu al siaj landoj-membroj fari la samon.

INTERVJUO

*kun samideano VESELIN DAMJANOV — artisto en la Ŝtata Muzikteatro
«Stefan Makedonski» — Sofio*

Demando: *K-do Damjanov, unue en la nomo de la bulgaraj e-istoj mi gratulas vin lige kun la premio «Argenta Liro», per kiu la Asocio de Muzikartistoj en Bulgario honoris vin. Kion vi dirus al ni pri tiu ĝojiga evento?*

RESPONDO: Mi dankas pro la gratuloj. Ili profunde kortuŝas min. Pri la premio kion mi povus diri? Eble vi scias, ke la Asocio de la Muzikartistoj en Bulgario, kiu nombras pli ol 10 000 membrojn, aljuĝas ĉiujare premiojn pro atingoj en la muziksceneja arto. Ĉi-jare oni premiis min per la „Argenta Liro“ pro mia sukcesa prezentigo en la rolo de Ivan Torapov el la sovetaj opereto „La gitaro muziku!“ sur la scenejo de la Moskva Opereta Teatro. La aljuĝo de la premio koincidas kun mia tridekjara muzikartista agado.

Demando: *Por ni, k-do Damjanov, estas ankaŭ interese ekscii, kiel vi pritaksas vian partoprenon en la kultura programo de la 63a UK de E-o en Varno.*

RESPONDO: Neoportune estas por mi eldiri opinion pri mia partopreno en la programo de la 63a. Tiam mi estis aparte emociita pro la fakto, ke unuafoje mi aperas antaŭ tiel multnombra kaj varia internacia publiko el la tuta mondo. Vere, en Varno okazis mia unua internacia recitalo kun kantoj en E-o. La melodioj de kelkaj el la lastaj estas komponitaj de mi.

Pri la recitalo mi estis kontenta, ĉar, kvankam oni fiksis ĝin por la 14a horo — laŭ mi tempo nekonvena por koncertoj, — kaj malgraŭ ke samtempe okazis 12 aliaj kongresaj aranĝoj, ĝi tamen estis amase vizitita. Ĉiuj aŭskultantoj kun granda intereso ĝisatendis la finon de la programo. Multaj kantsatantoj eĉ atendis ankoraŭ por ricevi aŭtografon. Mi bedaŭras nur pri tio, ke oni ne registris sur magnetofonbendo mian recitalon, kiu ĉiam memorigus al mi pri tiu grava mia prezento antaŭ internacia publiko.

Ĝojiga estas ankaŭ la fakto, ke la eldonita de „Balkanton“ gramofondisko kun kan-

oj interpretitaj de mi en E-o, trovis eksterordinaran akcepton inter la partoprenantoj de la kongreso. La gramofondisko estis tre rapide disvendita kaj aperis neceso reeldoni ĝin. La kongreso pasis antaŭ longe, sed mi ankoraŭ ricevas leterojn de nekonataj e-istoj el diversaj landoj, kiuj esprimas sian admiron pri la kantoj kaj deziras posedi la tekstojn de iuj el ili.

Demanejo: *Nun permesu al ni pli specialan demandon: Ĉu vi utiligas la Internacian Lingvon dum viaj spektakloj?*

RESPONDO: Tuj mi povas respondi pozitive: jes! Kaj tion mi multfoje strebas atingi antaŭ neesperantista publiko laŭ tre natura maniero. Kiam ĝi tute ne atendas, post interpretado de kanto en E-o, aŭskultata kun la sama atento, kiel la antaŭaj, mi turnas min al la publiko, petante, ke ili divenu, en kiu lingvo estis interpretita la kanto. Iuj diras — en hispana, aliaj pensas — en portugala aŭ rumana. Estas okazoj, kiam oni ankaŭ ĝuste divenas — en E-o. Ĉiam mi interpretas la sekvan kanton en E-o, kaj poste demandas, ĉu la lingvo estas bona por kantado? Ĉu ĝi plaĉas al la publiko? Tiu mallonga dialogo permesas malkaŝe kaj spontane popularigi la Internacian Lingvon inter la ŝatantoj de kantoj.

Mi praktikas ankaŭ alian manieron. Se mi ekscias, ke dum la prezento en la salono de la Ŝtata Muzikteatro ĉeestas e-isto, mi penas saluti lin en E-o el la scenejo en konvena momento. Ekzemple, al mia spektaklo en Sofio venis foje s-ino Tonkin — la edzino de la prezidanto de UEA. Ŝi estis treege surprizita, kiam mi salutis ŝin tiamaniere. Ŝi ne povis kredi al siaj oreloj, ke tio estas ebla. . .

Demando: *La pasintan jaron en urbo Clermont Ferrand, Francio, vi gajnis la unuan premion en la Internacia Festivalo de la E-kanto. Kiaj estas viaj impresoj pri tiu konkurso?*



RESPONDO: Mi povas diri, ke tiu festivalo jam ĉe sia unua manifestiĝo reliefigis kiel grava evento en la E-mondo kaj kun tre seriozaj konsekvencoj. Ĝi estis organizita je alta profesia nivelo kaj trovis vastan lokon en la francaj gazetaraj, radio kaj televido. Tamen mi estis tre surprizita,



kiam pri tiu internacia aranĝo mi legis ankaŭ en la soveta revuo „Muzika Vivo“. Sendis al mi ekzempleron e-isto el USSR. Tion mi mencias, por ke oni vidu la lokon de la konkurso en la internacia muzika vivo. Paralele kun tio mi deziras atentigi ankaŭ pri la grava rolo de la arto por gajni adeptojn kaj simpatiantojn al la nobla ideo. Mi mencias nur, ke dum la tiel nomata „malvarma milito“ je la fino de la 40aj jaroj, ĉe la mondaj forumoj de la pachtalantoj la kantoj de Paul Robson efikis multe pli forte ol la alvokoj de multaj oratoroj. El mia propra sperto mi bone konas la forton de la arto tiurilate.

Mi devas serioze pripensi kiamaniere aliri al la E-movado pli multe da artistoj, muzikistoj, poetoj, agantoj en la sfero de la arto kaj kulturo, kiuj per sia verkaro helpus efike por realigo de la humana ideo pri komuna lingvo, de la ideoj pri paco, kompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj.

Demando: Ni ekscias, ke antaŭ nelonge vi revenis el Hispanujo Ĉu vi povus rakonti ion pri via vizito en tiu lando?

RESPONDO: Mi estis invitita de la Centro de E-o en Barcelono por prezenti memstaran recitalon en la nova, ĵus inaŭgurita domo de la Muzik-kantista Societo „Orfeo Graciens“, kiu festis sian 75-jaran jubileon. Radio Barcelono elsendis 20-minutan intervjuon kun mi en E-o pere de interpretisto. Poste mi plenumis kelkajn originalajn kantojn nur en E-o. Samtempe la plej granda ĉiutaga gazeto en Barcelono „Avui“ publikigis artikolon de loka e-isto, kiu kiel kongresano vizitis mian pasintjaran recitalon en Varno.

Dank' al la e-istoj tiu mia recitalo, destinita por neesperantista publiko, okazis en plenplena salono kun eksterordinara sukceso. Oni aljuĝis al mi la ordenon „Orfeo Graciens“, kiun oni por unua fojo donis al fremdlandano. Kaj jen kion deklaris al mi la prezidanto de la Centro de E-o en Barcelono post la recitalo: „Sinjoro Damjanov, nur dum kelkaj tagoj vi faris tiom multe por E-o, kiom ni ne povus fari dum jaroj!“ La recitalon oni registris sur magnetofonbendo, kiun mi posedas.

Demando: Kaj ĵe la fino, ĉu vi povus diri al ni ion pri viaj estontaj planoj konekti kun E-o?

RESPONDO: Nun kune kun miaj gekolegoj Belka Beleva kaj Anani Anev ni streĉe preparas la dramon „Amo“ de la franca verkisto Paul Jerald (Pol Jerald). Ĝin ni prezentos en la 64a UK de E-o en Lucerno. Poste atendas min kelkaj koncertoj en Triesto, Jugoslavio, Strasburgo ktp. Mi serioze pripensas la kantojn en E-o por nova gramofondisko. Mia deziro estas, ke la disko plaĉu al la e-istoj de ĉiuj landoj. Kiel vi vidas, antaŭ mi staras multa laboro, kreado kaj manifestado. Mi devas trovi tempon por realigo de tiuj kaj aliaj ideoj kaj iniciatoj. Nur ni estu sanaj!

Interjuis: D. Mutuŝev

SUKCESAJ KONCERTOJ DE MARIA ANGELOVA EN ITALIO

La konata bulgara operkantistino Maria Angelova koncertis dum majo en Italio laŭ invito de italaj e-istoj.

Du el la koncertoj estis dediĉitaj al la Internacia Jaro de la Infano kun speciala programo „El la mondo de la infanoj“.

La Studa Centro pri Daŭra Edukado en u. Lavagna organizis la 24an de majo bril-sukcesan koncerton en salono Rocca. En la koncerto partoprenis ankaŭ infana orkestro de flutoj. Akompananto kaj estro de la orkestro estis la fama majstro Ranzio Buccisarelli.

En Venecio partoprenis ankaŭ infana kant-



M. Angelova intrer siaj aŭskultantoj — italaj gelernantoj

grupo, kreita de fratino Anĝelika, nia samideanino.

Sekvis koncertoj en Viszenza, Ravenna kaj Bologna. La kritiko rimarkigis, ke „Angelova ne nur havas belan voĉon, sed faras grandan arton“.

La televido en Bologna prenis intervjuon de s-anino Angelova, emfazante ŝian partoprenon en diversaj E-aranĝoj. La elsendo daŭris unu horon.



EMIL ŜEKERĜIJSKI ĈIAM VIVAS INTER NI!

Jes, Emil Ŝekerĝijski restas kaj ĉiam restos viva inter ni eĉ post sia heroa morto. Per sia ĉarma fizionomio, rigardanta nin el la portretoj, kroĉitaj sur lia ekzekutloko en la monto Osogovo aŭ en la Muzeo de la Revolucia Movado en Sofio, en la legejo, kies patrono li estas, en nia loĝejo kaj aliloke, Emil vere estas inter ni. Efektive estas tiel, ĉar krom

sincera amikeco nin kunligas ankaŭ vico da eventoj el nia familia vivo.

En la komenco de 1931 j. la junulo Emil Ŝekerĝijski aperis en nia proleta kvartalo „Juĉbunar“ en Sofio kaj baldaŭ fariĝis unuiganta persono inter la malriĉaj loĝantoj — ne nur inter la junaj, sed ankaŭ inter la plenaĝaj laboruloj. Pro tio jam tiam li fariĝis nia proksima amiko kaj kamarado, intime nomata „Ŝekera“.

Ofte post kuraĝaj surstrataj bataloj kontraŭ la policianoj, kiom ajn ni estis lacaj aŭ kruele torturitaj, ni tuj entuziasmiĝadis pro la ardaĵ paroladoj de Emil en la legejo. Li parolis aŭ prelegis pri la nacia problemo, pri patriotismo kaj internaciismo de la laborista klaso, pri la utilo posedi la internacian lingvon Esperanto, pri la reakcia esenco de la cionismo inter la hebreaj laboramasoj, pri amo, sobreco k. a. Atente li donis al ni ankaŭ konsilojn pri inda konduto en la policejo ĉe arestado, kiujn ni soife konsumadis. Ĉio ĉi emociis niajn junajn korojn kaj pliaktivigis nin en la batalo por la plej justa socio — la socialismo kaj la komunismo.

Profunde ni akceptadis ankaŭ liajn marksismajn lecionojn en la malgranda klubejo sur str. „Antim I“ kaj „Piro“ (nun Andrej Ĵdanov) en la nelegala komsomola rondeto post la faŝista puĉo de 19.5.1934. Emil ĉiam optimisme komencis kaj finis la lecionojn per sia forte mobilizanta rideto, taktike kontrolis, ĉu bone ni komprenis la temon, denove klarigis iujn pli komplikajn momentojn kaj fine restadis sola en la klubejo por finpretigi materialojn por la literaturaj ĵurnaloj „Ĵar“, „RLF“ k. a., kies redaktoro estis li mem, aŭ por efektiviĝi planitan renkontiĝon kun nelegalaj kamaradoj.

Emil Ŝekerĝijski estis ne nur intelektulo, literatoro kaj ĵurnalisto, sed ankaŭ bonega amasaganto, amasulo. Li rapide trovis konvenajn motivojn, manieron kaj stilon por


konversacii ĉu kun fama intelektulo, ĉu kun ordinara laboristo, ĉu kun politika kontraŭulo.

Ni memoras lin kiel eksigitan studenton kaj nelegalan revoluciulon, kiam li estis devigita sub fiktiva nomo labori pezan fizikan laboron por vivteni sin. Ofte li laboris ekzemple kiel masonisto. Sed li volonte faris tion por havi pli proksiman kontakton kun la homoj de la laboro. Foje, pasante tra placo „Banski“ kaj ŝtr. „Serdika“, ni vidis lin en la armaturo de la konstruata tiam hotelo „Rojal“. Li bonanime okulsignis al ni kaj plue masonis kaj konversaciis vigle kun ŝiaj kolegoj masonistoj.

Kelkan tempon nia rekta ligo kun Emil estis anstataŭita de malrekta.

En 1940 j., kiam nia partia organizaĵo pridiskutis la raporton „Kiamaniere la revoluciaj agantoj devas kondukti antaŭ la polico“, ni tuj konjektis, ke ĝia aŭtoro estas Emil. Tiamaniere ni denove sentis lin inter ni. Sed aparte proksima fariĝis Emil al ni dum marto-julio 1944 j., en nia nova loĝejo en u. Kjustendil, kie ni devige estis enloĝigitaj de la faŝisma potenco. Por unua fojo nun, post 1937—1939 j., ni vidis lin denove. Li aperis ĉe la pordo kun sia entuziasmiga rideto kaj rekte, kiel antaŭ plej proksimaj kamaradoj, eksplikis la celon de sia politika „gastado“ ĉe ni. Nature, kiel sperta konspiranto, Emil havis en la urbo ankaŭ aliajn kaŝloĝejojn kaj helpantojn, sed li preferis utiligi nian apudurban loĝejon, speciale dum sia irado al la partizana taĉmento kaj revenante de ĝi. Ĉi tiun preferon ni opiniis ŝuldata al tio, ke en nia loĝejo oni konservadis batalprovizojn, kiuj pli facile estis transporteblaj al la monto. Krome, Emil forte ekamis nian sesjaran filon, kiu same ekamis lin. Grandan feliĉon ili ambaŭ sentis nokte, kiam povis kune pasigi kelkajn horojn unu apud la alia, en la lito. Onklo „Stefan“ rakontis al li pri la grandaj venkoj de

la Soveta Armeo kontraŭ la hitleranaj faŝistoj, pri la heroaj bataloj de la partizanoj kontraŭ la faŝistoj en nia lando kaj pri la alproksimiĝanta venko, kiu sekurigis nian liberon kaj feliĉan vivon.



Foje, post unu tia milda renkonto kun nia filo, Emil donis al ni leteron, adresitan al Stefan Ŝekerĝijski, por ke ni enlasu ĝin en poŝtkeston. Komprenante nian nediratan scivolemon li deklaris, ke li estas patro de du filetoj, unu el kiuj nomiĝas Stefan. Evidente ĉe li pli forte revekiĝis la gepatra sento. Ni apenaŭ nun aŭdis, ke Emil havas infanojn.

Multfoje li kun ĉarma rideto foriris al la monto ĉe la partizana taĉmento kaj revenadis de ĝi kun sukcese faritaj bataltaskoj kontraŭ la faŝistaj ĝendarmoj. Tiel ankaŭ la 2an de aŭgusto 1944 Emil forlasis nian loĝejon, denove direktante sin al la monto, sed ne revenis plu...

Anstataŭ li la sekvan tagon en nian kaŝloĝejon eniris la terura novaĵo pri lia lasta malegala batalo kontraŭ multnomraj profesiaj murdistoj-faŝistoj.

(Sur p. 10)



INTERNACIA JARO DE LA INFANO

SOLENA KUNVENO EN SOFIO

La 8an de junio 1979 en la granda salono de la Domo de Tekniko en Sofio okazis solena kunveno, organizita de la Sofia E-societo „Maksim Gorkij“ dediĉe al la Internacia Jaro de la Infano. Ĉeestis pli ol 300 personoj, inter kiuj ankaŭ gvidantinoj de la Bulgara Virina Movado kaj gastoj el fremdlando. Granda parto de la publiko estis infanoj.

Anoncantoj de la riĉa literatura-muzika programo estis la gejunuloj Jorĵeta Zdraveva kaj Branimir Vălev. Sur la scenejo viciĝis la ĥoro de la sofiaj infanoj e-istoj „Verdaj Steletoj“. Aparte kortuŝa estis la momento, kiam el inter ili al la antaŭscenejo alkuris du etaj kvarjaraj infanoj — la plej junaj e-istoj Anjo kaj Geĉjo, kiuj per dolĉaj voĉetoj salutis en E-o. Anjo diris: „Feliĉan Internacian Jaron de la Infano!“, kaj Geĉjo: „Paĉon, paĉon sur la tuta tero!“. La vokala grupo „Verdaj Steletoj“ sub la gvido de Stefka Kalimenova kaj Maria Kolarova plenumis riĉan programon. El inter ili elpaŝis infanoj, kiuj jen recitis, jen kantis, kaj la ĥoro akompanis ilin per fermita buŝo aŭ per plaŭdo de la manoj kaj ritmaj dancaj movoj, kion ofte faris ankaŭ la infana publiko en la salono. Entuziasme deklamis la naŭjara Isja Oljanova, kiu plenumis „Espero nia!“ de Asen Grigorov. Riĉan programon plenumis la infana ĥoro „Arĝentaj Sonoriletoj“ el Kjustendil, kiu ravis la publikon per sia lerteco kaj perfektaj voĉoj. Poste plenumis programon la grupo „Juneco“ sub la gvido de Katja Hristova. Salutojn per sia arto prezentis pli aĝaj gee-istoj. Karamfilka Ada-

mova kaj Stefka Kalimenova, solistinoj de la Sofia E-Ĥoro, plenumis per siaj dolĉaj voĉoj du duetojn: „Dormu, dormu...“ — lulkanto de Ŝubert, kaj „Kanto de la sezonoj“ laŭ teksto de Elvira Lippe. Dimitro Denĉev plenumis: „Junularo, formu rondon!“ kaj „Himno de Zamenhof“. La aktoro Boĵidar Matanov recitis la popularan fabelon de G. Rajĉev „La plej bela birdido“. La infanverkistino Ljudmila Paspaleeva tra legis originalan prozaĵon pri la amikeco de la infanoj el diversaj landoj. Maria Kolarova salutis la ĉeestantajn infanojn en la nomo de la patrinoj-e-istinoj.

La prezidantino de E-societo „M. Gorkij“ Belka Beleva faris interesan prelegon pri la stato de la infanoj en nia lando kaj tutmonde, indikante multajn gravajn naciajn kaj internaciajn iniciatojn lige kun la Internacia Jaro de la Infano (eltiraĵon el ŝia raporto ni donas aparte). Je la fino de sia prelego ŝi invitis la E-poeton Simeon M. Simeonov, gasto de la solenaĵo, reciti sian versaĵon. La poeto recitis sian „Kanton de la infanoj e-istoj“, kiun la publiko sincere aplaudis.

Oni regalis la infanojn per sandviĉoj kaj bombonoj.

Observante la konduton de la infanoj sur la podio kaj en la salono, ilian viglan partoprenon, iliajn evidentajn ĝojon kaj entuziasmon, la plenaĝuloj estis kortuŝitaj kaj fieraj: Esperanton prenas en siajn korojn kaj en siajn manojn la plej juna generacio!

Rajna Konstantinova

Detalojn pri lia legenda morto kune kun liaj akompanantoj Stojan Ludev kaj Stojan Stoimenov ni eksciis poste. Sed kion alian ni povis fari tiam, krom plue doni nian modestan helpon al la aliaj restintaj vivaj batalantoj, daŭrigantoj de lia afero...

La faŝistoj mortigis Emil korpe, sed spirite li restas viva inter ni kiel konsekvenca patrioto, internaciisto kaj esperantisto.

Benvenisti Stela kaj Mois

FAKTOJ PRI LA INFANOJ TUTMONDE

El la parolado de BELKA BELEVA

Antaŭ 20 jaroj (la 20an de novembro 1959) la Ĝenerala Asembleo de UNO akceptis la faman Deklaracion pri la Rajtoj de la Infanoj. Ĝi enhavas 10 principojn, kiuj antaŭvidas ke:

— la infano devas ĝui specialan juran protekton por evolui sana kaj normala en fizika, intelekta, morala, spirita kaj sociala rilatoj en kondiĉoj de libero kaj digno;

— la infano havas rajton je nutraĵo, loĝejo, amuzado, medicinaj zorgoj, kreski



en atmosfero de amo, kompreniĝo, morala kaj materiala sekureco, esti protektata kontraŭ ĉiaj formoj de neglekto, krueleco kaj ekspluato, de rasa aŭ ajna diskriminacio;

— la infano devas esti edukata en spirito de kompreniĝo, reciproka estimo kaj amikeco inter la popoloj, de nobla humanismo kaj paco.

Laŭ la oficialaj donitaĵoj de UNESKO en la kapitalismaj landoj tamen:

— ĉ. 300 milionoj da infanoj en la mondo neniam satmanĝas;

— ĉiujare pro malsato mortas 15 milionoj da infanoj de 1 ĝis 5-jara aĝo;

— en pli ol 40 landoj (precipe en Afriko, Azio kaj Polinezio) ĝis hodiaŭ ne ekzistas leĝo pri deviga vizitado de lernejo;

— en Turkio, Kosta-Riko, Irano, Pakistano per leĝo estas permesite, ke oni komencu laboradon 12-jara;

— la plimultiĝo de la divorcoj en Usono kaŭzis la aperon de milionoj da „senhejmaj“ kaj „forlasitaj“ infanoj;

— la polico en Bankoko (ĉefurbo de Tajlando) malkaŝis eksterleĝan truston por komerco per malgrandaj infanoj;

— en Anglio kaj FR Germanio dekmiloj da infanoj sub la 14-jara aĝo estis sub esploroj en la polico pro faritaj de ili krimoj;

— laŭ donitaĵoj de la Ĝenerala Labor-konfederacio en Italio pli ol 500 000 infanoj en aĝo inter 8 kaj 14 jaroj laboras neniam trapasinte la lernejan sojlon;

— en la UK de E-o en Varno japana

samideanino dividis kun la kongresaninoj, ke grava tasko de la nuntempa japana virino estas sugesti al la knabeto, ke knabino estas homestaĵo egala al li.

Kaj kia estas la stato de la infano en la socialismaj landoj? Ni bonege konas tiun sanan kaj feliĉan infanon el festivaloj kaj kongresoj, el internaciaj tendaroj kaj ekskursoj, el matematikaj olimpikoj kaj muzikkonkursoj, el internaciaj sportludoj kaj korpkulturaj festoj:

— en la lernejoj de USSR la instruado estas farata en 57 lingvoj;

— en GDR varman tagmanĝon en lernejo havas 72% el ĉiuj lernantoj; granda parto el ili — ankaŭ lakton por matenmanĝo;

— en Habano (Kubo) estas malfermita kuirejo-fabrika, kiu preparas nutraĵon por 17 000 infanoj;

— pri la bulgaraj infanoj kaj patrinoj tagnokte zorgas miloj da kuracistoj; 99% el la naskoj okazas en specialaj naskodomoj senpage;

— en Bulgario la plej alta takso, kiun pagas la gepatroj por infano en la vartejo, prezentas nur kvaronon el la realaj elspezoj — la ceterajn tri kvaronojn pagas la ŝtato;

— en Bulgario lastatempe ĉiujare 330 000 infanoj (junpioniroj kaj mezlernejoj) pasigas parton de siaj someraj ferioj en 1100 ripoztendaroj kun minimuma pago;

— ktp. ktp. (Oni povas longe paroli kaj multon, multegon citi pri la zorgoj de la socialisma ŝtato kaj socio pri la infanoj).

ORGANIZA VIVO

„ROZA VALO“ 75-JARA

La 22an de junio brile celebris la 75-jariĝon de sia E-societo „Roza Valo“ la e-istoj de Kazanlâk. Por la solenaĵo venis gastoj el multaj najbaraj distriktoj. Ĝi okazis en la urba kinosalono „Iskra“.

En la prezidio sidis la reprezentanto de la CE de BEA k-do Kunĉo Vâlev, reprezentantoj de diversaj distriktaj kaj societaj estraroj, oficialaj gastoj: la prezidanto de la Urba Popola Soveto k-do Stanĉo Koev, la estro de fako „Kulturo“ Janka Najdenova, reprezentanto de la Urba Komitato de BKP Cvjatko Cvetkov ka. Junpioniroj vigle invadis la salonon kaj enmanigis florojn al la prezidantoj. Muziko ekludis la E-himnon. Ĉiuj ekstaris. Juna triopo solene enportis la verdan societan flagon kaj ekstaris sur la scenejo.

La prezidanto de „Roza Valo“ Kiril Ĉindin bonvenigis la ĉeestantojn kaj malfermis la solenan kunvenon. Li faris belan priokazan raporton, trarigardante koncize la historion de la E-movado en la urbo sur

la fono de la tutlanda E-movado. Kun intereso oni eksciis, ke E-o tre frue penetris la urbon — en la fino de la pasinta jarcento tie jam aktivis kelkaj e-istoj. Tion oni vidas el la Zamenhofa Adresaro, kie estas donitaj la nomoj de 13 e-istoj el Kazanlâk. En 1903 ili unuiĝis en E-societon, kiu ricevis la belan nomon „Roza Valo“. Ĝiaj fondintoj kaj plej elstaraj aktivuloj estas Stefan Apostolov, Ctojan Mârzev, Conjo Ivanov, Dimitro Nanĉev ka. Tio estas la kvina E-societo en la lando — post Sofio, Târnovo, Plovdiv, Ruse.

Dum la milita periodo (1912—1918) la societo estis paralizita, sed tuj poste ĝi estis restarigita surbaze de E-kurso en la loka pedagogia lernejo. Restarigis ĝin Nanjo Ganĉev el la regiono de Karlovo, Stojan Kolev kaj Manjo Petkov el v. Dâbovo, Jeĵjo Genev kaj Ivan Popov el Mâgliĵ, Andrej Isaev kaj Mihail Mihajlov el Kazanlâk kaj Sipka.

En la antifaŝista Septembra Ribelo 1923



partoprenis la e-istoj komunistoj Cvjatkó Radojnov, Bončo Sanov, Ivan Karastojkov, Petko Dimov, Tenjo Bâzelov, Kânjo Garbatulov, Tončo Bezlev, Stefan Tâpanov ka.

Jurnalo „Verda Stelo“ de 27. 10. 1924 skribis: „En la urbo de la rozoj E-o enradikiĝas pli kaj pli. Oni laboras vigle kaj senlace, estas malfermitaj E-kursoj. Dum la someraj varmegoj en la urbo funkciis E-kurso, vizitata plejparte de instruistoj. Ĝi donis bonajn rezultojn. La agado de Penka Borisova, juna e-istino, estas laŭdinda. La propaganda E-semajno estis malfermita per matensolenajo, tre bone vizitata. Paroladon en E-o faris Koljo Vladimirov. Poste okazis publika kunveno, en kiu Gunčo Gunčev, docento el la Sofia Universitato, parolis je temo „Lumo en la abismo de la multlingveco“.

En 1925 en Kazanlâk revenis Ivan Sarafov, redaktoro de biblioteko „Verda Stelo“. Li, kiel instruisto-komunisto, estis eksigita de la reacia regpotenco por ĉiam el ĉiuj lernejoj de la lando. En la urbo ekbolis ankoraŭ pli vigla E-agado. En la biblioteko de legejo „Iskra“, kie laboris s-ano Todor Ivanov, estis fondita E-fako. „Roza Valo“ fariĝis forĝelo de e-istoj, plejparte lernantoj el la pedagogia lernejo. Fininte la studadon ili disiris al siaj naskiĝlokoj aŭ aliloken kaj tie, instruistoj, entuziasme eklaboris por E-o. Oni baldaŭ fondis E-societojn en la vilaĝoj Sipka, Enina, Gabarevo, Tâja, Skobeleva, Mâgliŝ ka.

Dum la tridekaj jaroj „Roza Valo“ fariĝis centro de revolucia agado. En la armita glora kontraŭfaŝista batalo (1941—1944) partoprenis ankaŭ multaj e-istoj el Kazanlâk. Petro Jonkov, Pavel Stanev, Nedelčo Karaivanov kaj Kunčo Kunev estis palmorigitaj, Todor Ganarev kaj Sotir Ĝavdarov fariĝis partizanoj, Kiril Ličev kaj Ivan Pataroŝev estis ŝetitaj en malliberejon, Tanjo Djankov, Apostol Antonov kaj Lalju Džânov forpelitaj el la gimnazio pro disvastigo de la broŝuro „La internacia lingvo de la laborista klaso“. La polico arestis kaj batis e-istojn, kiuj promenis al la apudurba loko „Tjulbeto“. Ĝi malpermesis la E-kurson en lernejo „Otec Paisij“, gvidata de Petro Kamburov.

Post la liberiĝo elsub la faŝismo kaj kapitalismo por E-o en Kazanlâk malkovriĝis nova, libera vojo. Nun antaŭstaras la tasko konstrui modernan E-domon. La loko por tio jam estas fiksita — sur la ĉefstrato „Georgi Dimitrov“. La membroj de la societo havas kontaktojn kun e-istoj el ĉiuj landoj de la mondo. Regule funkcias E-kursoj por civitanoj, por laboristoj en industriaj entreprenoj, por lernantoj. Estas kreitaj bonaj ligoj de la lokaj e-istoj kun la e-istoj de Nagkaniĝa (Hungario), kun kiu urbo Kazanlâk estas interfratiĝinta. En

la UK de E-o en Varno partoprenis 32 e-istoj el Kazanlâk.

Post la raporto de k-do Ĉindin estis prezentitaj salutoj. La prezidanto de la Urba Popola Soveto k-do Stančo Koev varme salutis rozvalanojn kaj tralegis la dekreton, per kiu la Stata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris E-societon „Roza Valo“ per la plej alta kulturordeno „Kiril i Metodi“ — I grado. K-do Koev solene kroĉis la ordenon sur la verdan flagon. Salutojn prezentis ankaŭ la estrino de Fako „Kulturo“ en Kazanlâk k-dino Najdenova.

Emocian salutparoladon en la nomo de CE de BEA faris k-do Kunčo Vâlev, kiu atentigis ankaŭ pri la plej gravaj taskoj de la bulgaraj e-istoj antaŭ la jubilea 40a kongreso en 1980. Li aparte substrekis la neceson pri altiro de la junularo (lernantoj, laboristoj, oficistoj) al nia Movado, pro kio oni devas ŝanĝi la stilon de laboro, uzante formojn plej altirajn por la junaj homoj (amuzoj, dancvesperoj, ekskursoj, e-istaj renkontiĝoj, laborbrigadoj ktp.); ankaŭ la neceson pri altiro de la instruistaro, pri reciproka kompreniĝo kaj harmonia kunlaboro inter la novaj kaj malnovaj generacioj de e-istoj ktp.

Sekvis salutparoloj de reprezentantoj de diversaj E-societoj kaj riĉa belarta programo, kiun partoprenis ankaŭ niaj E-kantistinoj Rene Iordanova el Stara Zagora — laŭreato de Dimitrovpremio, kaj Vasilka Tomajova — solistino de la opereto de Kazanlâk.

Post la solena kunveno la e-istoj iris al restoracio, kie ili vespermanĝis kaj pasigis ankoraŭ kelkajn horojn en amika E-rondo.

K. Ivanov

TRADICIA E-RENKONTIĜO EN SAMOKOV

Nia buso gaje kuris al la bela montara urbo Samokov — al la tradicia jam renkontiĝo de e-istoj el la distriktoj de sudokcidenta Bulgario. Amike renkontis nin lokaj e-istoj, membroj de E-societo „Rila Esperantisto“.

La saman sabatan vesperon (la 16an de junio) en la Junulara Domo okazis solena kunveno dediĉita al la 97a naskiĝtago de Georgi Dimitrov kaj al la batalo por paco. Krom ni, sofianoj, ĉeestis multaj e-istoj el aliaj distriktoj, ankaŭ civitanoj el Samokov. Parolis k-do Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM.

Artprogramon plenumis la turista ĥoro de Samokov, artistoj el la Bulgara E-Teatro kaj amatoroj.

Al ĉiuj partoprenantoj en la renkontiĝo oni disdonis esperantlingvan broŝuron verkitan de Vasil Trifonov — prezidanto de „Rila Esperantisto“. Ĝi rakontas pri la bela urbo Samokov, en la pasinteco centro



de fero-produkta industrio, naskiĝloko kaj skolo de famaj pentristoj kaj gravuristoj, kun ĉiam vigla, altspirita loĝantaro, fortikaĵo de la Bulgara Komunista Partio dum la burĝa regado.

Amika vespermanĝo kaj amuzado post la kunveno okazis en ripodomo apud v. Govedarci. La sekvan tagon niaj dommastroj promenis nin tra la ĉarma ĉirkaŭaĵo kun ombriĉaj pinarbaroj kaj kristale klaraj malvarmaj montaj riveretoj.

Stefan Sokolov

TUTLANDA SEMINARIO DE LA BULGARA MEM-KOMITATO

La 9an de junio en u. Polski Trâmbeŝ, distrikto de Veliko Târnovo, okazis seminario, organizita de la Bulgara MEM-Komitato kunlabore kun la loka E-societo „Progreso“. Ĝin partoprenis ĉ. 50 aktivuloj de MEM.

Post malfermaj vortoj de k-do Nikola Aleksiev la seminarianojn salutis Ĥristo Manolov je la nomo de „Progreso“, la unua sekretario de la komunuma komitato de BKP Damjan Iliev kaj la prezidanto de la komunuma pacdefenda komitato Ivan Kânĉev. La lastaj du alte aprezis la agadon de E-societo „Progreso“ sur la kampo de la internacia amikeco, kompreniĝo kaj paco. Grupo de junpioniroj bonvenigis la partoprenantojn en la seminario per kantoj, recitaĵoj kaj floroj.

Detalan prelegon je temo „Estiĝo, celoj, organiza strukturo kaj antaŭstarantaj taskoj de MEM“ faris Dimitro Haĝiev, prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato. Li substrekis la gravan taskon de MEM-anoj diskonigi per siaj internaciaj kontaktoj la konsekvencon pacan politikon de PR Bulgario kaj de la ceteraj landoj de la socialisma komunismo.

Tagmeze la urbestro donis bankedon por la seminarianoj.

Posttagmeze la seminarianoj aŭdis la inspiran informon de Ĥristo Manolov pri la riĉaj spertoj de E-societo „Progreso“ en ĝia agado sub la devizo „Esperanto en servo de la paco kaj la socia progreso!“ Aparte impresis la ĉeestantojn la intima kunlaboro de la societo kun la komunuma komitato de BKP, kun la komitatoj de la Patrolanda Fronto, de la virinoj, la Pacdefenda Komitato, la popola legejo kaj aliaj amasorganizoj.

Surbaze de ambaŭ prelegoj okazis viglaj kaj tre utilaj diskutoj, kiujn partoprenis seminarianoj el diversaj loĝlokoj: Ilija Ivanov — Loveĉ, Cvjatko Todorov — Ŝumen, Nejko Nejkov — Dve Mogili, Zdravko Nikolov — V. Târnovo, Rajna Stanĉeva — Preslav, ka.

La vesperon ĉiuj seminarianoj, frunte kun lokaj aŭtoritatuloj, metis florkronon antaŭ la monumenton de la pereintoj en la batalo kontraŭ la faŝismo. Poste oni oficiale malfermis la ekspozicion „Por feliĉa infaneco en paca kaj libera mondo“, konsistantan el infanpentraĵoj kaj ellaboritaj de infanoj objektoj el la urbo kaj el multaj landoj. La ekspozicio plaĉis al ĉiuj. Ĝi estas pruvo pri la grandaj eblecoj, kiujn disponigas E-o serve al similaj celoj.

Tuj poste en la salono de la popola legejo okazis urba kunveno, en kiu Nikola Aleksiev parolis pri la batalo por defendo de la paco. Sekvis artprogramo, kiun prezentis la junulara teatro de G. Orjaĥovica, — parte en E-o, parte bulgarlingve.

Dimitro Haĝiev

HUNGARA VESPERO EN SOFIO

Je la 30a de majo la sofia esperantistaro kolektiĝis por celebri 60 jarojn de la hungara socialisma revolucio. La celebrego estis anticipite interkonsentita inter BEA kaj HEA.

La bulgaraj e-istoj prezentis belartan programon el revoluciaj poezioj kaj rakontoj de hungaraj poetoj kaj verkistoj. Sonis konvenaj kantoj. La sofia E-horo plenumis muzikprogramon, en kiu ankaŭ speciale por la okazo preparitan hungaran popolkanton.

Veninta el Hungario kvarpersona grupo, en kiu ankaŭ la konata al la bulgaraj e-istoj s-ino Eva Farkas, rakontis per dokumentoj — fotoj kaj tekstoj, akompanataj de muziko, pri la kondiĉoj, kiuj kaŭzis la revolucion, konigis la eventojn mem de la revolucio, ĝiajn ligojn kun la Granda Oktobra Revolucio kaj ĝiajn postsekvojn. La batalo por libero kaj homaj rajtoj, sama por la hungara kaj bulgara popoloj, elvokis vigan intereson ĉe la ĉeestantaro.


Efektiviĝis ankoraŭ unu granda kaj utila iniciato de niaj du frataj E-organizoj.

Dimitro Denĉev

Libervola laborbrigado el sofiaj e-istoj helpis la bonaranĝon de la E-kursejo kaj ripozejo apud Drujevo en la pitoreska Balkano.



En junio ĉi-jare k-do Georgi Idakiev festis 70 jarojn ekde sia naskiĝo kaj 53 jarojn de sia poresperanta agado. Kun E-o li konatiĝis kiel lernanto en urbo Radomir.



Poste, jam en u. Pernik, li aktive laboris por E-o inter la ministoj. Kune kun aliaj s-anoj el Pernik li estas fondinto de E-societo „Ivan Garvanov“, kiu aktivis kelkajn jarojn. Fervore korespondante, Idakiev kreis bonajn ligojn kun e-istoj en la lando kaj eksterlande.

Vastan kampon por E-agado Idakiev trovis en u. Ĥaskovo, kie li ekloĝis en 1952. Tie, malgraŭ la venko de la socialisma revolucio, la E-movado ankoraŭ stagnis. Idakiev eltrovis kaj aktivigis malnovajn e-istojn kaj en 1956 fondis novan E-societon, posteulon de la iama „Radio“, elektante por ĝi la nomon de la granda bulgara sciencisto kaj amiko de E-o prof. d-ro Asen Zlatarov, ĥaskovano. Ekde tiu momento Idakiev komencis aparte ardan kaj senlakan agadon por la prospero de la E-movado en Ĥaskovo kaj ĝia distrikto, kiu daŭras jam 23 jarojn. Kelkajn jarojn post la restarigo de la societo en la urbo li fariĝis ĝia prezidanto. Ĉe tiu posteno Idakiev restis ĝis 1967, kiam li ekgvidis la Distriktan Estraron de BEA. Multaj iniciatoj kaj obstina laboro por ties efektivigo, varbado de novaj membroj, organizado de kursoj, de diversaj entreprenoj — lokaj, regionaj kaj landaj, zorgoj pri sekurado de materiala bazo kaj rimedoj, pri altigo de la prestiĝo de

E-o kaj la E-movado antaŭ la lokaj kaj centraj institucioj — por ĉio ĉi Idakiev malavare kaj sindone fordonis siajn fortojn, tempon, trankvilon, rimedo n. Estis fonditaj novaj E-societoj en vilaĝoj Uzunĝovo kaj Kapitan Andreevo, restarigita la societo en Ĥarmanli. Paralele kun tio Idakiev ne nur ne malmultigis, sed plivastigis siajn kontaktojn kun eksterlando. Li korespondis kun dekoj da alilandaj e-istoj, gastis ĉe eksterlandaj e-istoj kaj gastigis tiajn, stimulis kaj helpis veturojn de grupoj kaj individuaj e-istoj al eksterlando.

Rezulte de lia vasta poresperanta agado E-societo „Prof. d-ro Asen Zlatarov“ plifortiĝis kaj okupis indan lokon en la bulgara E-movado. Ĝi fariĝis elstara inter la societoj en la tuta lando, samkiel konata al la e-istaj medioj fariĝis Georgi Idakiev.

Nun, celebrante lian 70-jaran jubileon, ni, la e-istoj de Ĥaskovo, profunde dankas lin pro ĉio, kion li faris por la progreso de la E-movado en nia urbo kaj distrikto. Ni elkore bondeziras, ke liaj fortoj, tre freŝaj por tia aĝo, ne ĉesu ankoraŭ dum multaj jaroj, ili ankoraŭ longe ardu por nia amata Esperanto!

Luka Vâlcanov

E-veterano el Ĥaskovo

CELEBRO DE GEORGI IDAKIEV

La 10an de junio en la salono de la Urba Komitato de Komsomolo en Ĥaskovo kolektiĝis multaj e-istoj kaj reprezentantoj de sociaj organizoj el Ĥaskovo, gastoj el aliaj urboj kaj E-societoj por celebri la 70-jaran jubileon de k-do Georgi Idakiev.

Raporton pri la vivovojo kaj la pli ol 53-jara agado de la jubileulo faris Luka Vâlcanov — vicprezidanto de la E-societo en Ĥaskovo. Li emfazis la grandajn meritojn de Idakiev por restarigo de la E-societo en 1956 kaj lian sindonan agadon por aktivigo kaj plifortigo de la E-movado en la urbo kaj la distrikto.

Post la raporto multaj dankemaj e-istoj kaj gastoj diris varmajn salutvortojn al la jubileulo, bondezirante al li ankoraŭ multe da jaroj de aktiva kaj fruktodona poresperanta agado.

K-do Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM, tralegis salutadreson de la Centra Estraro de BEA al la jubileulo.

K-do Idakiev ricevis ankaŭ multajn donacojn kaj florojn.

Post malgranda koktelo, kiu pasis en amika kaj koreca atmosfero, okazis komuna fotado.

Inĝ. Nikola Uzunov



La 4an de julio en Sofio okazis impona celebrego de k-do Violin Oljanov lige kun lia 60-jariĝo. La celebrego estis organizita de la Centra kaj Distrikta Estraroj de BEA, de la Instruista Sekcio kaj la Sofia E-Societo „Diĉo Petrov“.

Raporton pri la vivo kaj agado de Oljanov faris k-do Kunĉo Vălev. Li priskribis la riĉan kaj multflankan agadon de la jubileulo kiel sociaganto kaj kontraŭfasisma batalanto, kiel sindona esperantisto. La nomo de Violin Oljanov estas vaste konata en nia lando kiel elstara E-pedagogo, aŭtoro de E-lerniloj, de valoraj lingvaj kaj metodikaj artikoloj, kiel E-literatoro.

La jubileulo estis surŝutita de salutoj, donacoj, floroj en la nomo de la CE de BEA, DE de BEA, la Instruista Sekcio, E-Societo „Diĉo Petrov“, la Bulgara MEM-Komitato, de multaj reprezentantoj de provincaj distriktoj kaj societaj estraroj, venintaj speciale por la okazo. Oni tralegis ankaŭ kelkajn el la dekoj da ricevitaĵoj gratuleteroj kaj telegramoj.

La jubileulo varme dankis al ĉiuj bondeziroj.

Estis plenumita belarta programo el la verkaro de V. Oljanov.

Ĉeestinto

Juna esperantisto

Interŝanĝu spertojn!

KONATIĜU — „JUNECO“*

Unuaj paŝoj

Por fondi junularan klubon kolektiĝis 14 gejunuloj, el kiuj nur 6 komprenis E-on. Tiel naskiĝis la junulara klubo „Juneco“ en Vilnius, Litova SSR. Tio okazis la 11an de julio 1961. Unua prezidanto iĝis Vitautas Šilas tiutempe studento en la fizika fakultato de Vilnusa Universitato.

La unua paŝo estis farita tuj: dum tri semajnoj estis preparita teatraĵo de Marjorie Boulton (Marĵori Boulton) — „Drasta kuracado“, kiun spektis la partoprenantoj de la 3a BET. Poste ĝi decidis „lerni paroli“. La kunvenoj okazis en junulara kafejo — komence unufoje en monato, poste ĉiusemajne.

Oni organizis E-kursojn unue en la Vilnusa Universitato. Por lingvopraktiko la studentoj veturis al labora kaj ripoza tendaroj: konstruante domojn en kolhozo ili ĉiutage praktikis E-on.

Revuante la 17-jaran agadon

Ni volus sumigi ĉion, sed ni devas limigi nin nur pri faktoj. Kaj kiel enkalkuli la akiritan sperton, amikecon?...

Novjaraj renkontiĝoj (ekde 1968), printempaj boatadoj tra Ignalinaj Lagoj (ekde 1968), aŭtunaj literaturaj renkontiĝoj „Muzo“ (ekde 1969) plaĉis ne nur al ni, sed ankaŭ al niaj najbaroj, fariĝis tradiciaj. Kion kapablas la klubo montris al la soveta e-istaro la 6a Balta E-Tendaro kaj la 9a Sovetunia Esperantista Junulara Tendaro (1967).

* El „Horizonto de Soveta Litovio“, kvara kajero, 1979.

Ĉirkaŭ 150 turistaj vojaĝoj okazis. Nia kantoj sonis ne nur ĉe Balta Maro. Altaĵo, Mezazio, Kaŭkazio, Uralo, Apudvolgio kaj Ukrainio ankaŭ aŭdis nin. Eksterlande ni partoprenis en kongresoj de STELO (en Bulgario), TEJO (en Hungario), MEM, Bulgara E-Asocio (en Bulgario). Gastis ni ankaŭ ĉe amikoj en Pollando, GDR. En nia klubo gastis polaj, bulgaraj, germanaj e-istoj.

Al 21 landoj ni vojaĝis letere. La rondo de geamikoj kreskas, ĉar nia adreso (SU-232000 VILNIUS, a. d. 61 „Juneco“) validas ĉiam.

Ĉiujare ni organizas E-kursojn por komencantoj. Finis ilin ĉirkaŭ 250 personoj. El ili 195 aliĝis al la klubo.

Kiom da diversaj E-kantoj sonis dum tiuj ĉi jaroj, ne eblas kalkuli. Granda parto de ili estas litovaj kantoj, kies tekstojn tradukis en E-on niaj klubanoj. Ili iĝis tre popularaj inter la soveta e-istaro. Dank'al niaj klubanoj estis eldonitaj du sondiskoj kun litovaj kantoj en E-o. Por la unua sondisko kantis popolaktoro de USSR V. No-reika.

Multe da tempo ni pasigis en la bibliotekoj: respublika, universitata, akademia — por kompili sliparon de E-libroj.

Kaj kiel taksu la klubon laŭ la skalo de USSR? La lastaj dek jaroj estis sukcesaj por „Juneco“ — por ĝi ĉiam estis loko en la deko de la plej bonaj E-kluboj.

Nin kunigas laboro kaj amikeco

Ni volus mencii personojn, dank'al kiuj la klubo naskiĝis, disvolviĝis kaj agas ĝis nun. Jen V. Šilas, K. Ambrasas, V. Papaurelis, A. Vala, T. Morkunaite, D. Žiūkaite

V. Matiukas — ĉiu el ili siatempe faris multon, por ke la klubo akiru propran vizagon kaj aŭtoritaton inter la aliaj kluboj, ke ĝi eduku la junularon en spirito de internaciismo, propagandu kaj interesigu junularon pri la lingvo de amikeco — Esperanto. Kio kunigas la klubanojn al unu kolektivo? Kompreneble, la komuna agado, la komunaj intereso, la amikeco, naskiĝinta en laboro.

En 1978 aŭtune proksime al Vilnius ĉe la Verdaj Lagoj okazis la tradicia literatura renkontiĝo „Muzo“, ĝojiganta per granda aro da partoprenantoj. La konkursoj de originala poezio, prozo, kantotekstoj, deklamado kaj la oratora jam jariĝis tutsovetaj, des pli ke ŝatantoj de la literaturo ne nur venas al la renkontiĝo, sed partoprenas ankaŭ foreste, sendante siajn verkojn poŝte.

En 1978 ni jam gastis ĉe e-istoj de Estonio, Latvio. Pli ol cent gastoj ĉi-printempe venis al la tradicia boatado tra Ignalina Lagaro. Malgraŭ la malvarma vetero, ĉiuj

partoprenantoj bone ripozis kaj forveturis kun bona humoro.

Esperanto — lingvo de amikeco! Ĝi kunigas homojn de diversaj nacioj, loĝlokoj, profesioj, aĝoj. Por gejunuloj tiun ĉi amikecon ne malofte kronas feliĉa finalo — nupto. Ne faras escepton ĉi-rilate ankaŭ nia klubo. Dum dek sep jaroj fondiĝis 12 esperantistaj familioj, en kiuj, se sumi, eniras dek sep gejunecanoj (t. e. membroj de „Juneco“), unu reprezentanto de alia vilnusa E-klubo, du el Kaunas, unu el Leningrado, unu el Ufa, unu el Pollando, unu el Brazilo. Nu, en la klubo ankoraŭ estas multaj gefraŭloj — venu, kaj vi povos elekti vian vivamikon!

Sed, kompreneble, ne tio estas la plej grava. Bonege estas, ke en la klubo sonas la lingvo de la internacia amikeco, ke ĝi helpas al ni amikadi kun diversnaciaj homoj kaj faras nian vivon pli interesa kaj enhavoriĉa.

M. Gaidamavičiene

K O R E S P O N D A Ŝ A K O

Bona prezentigo de bulgaraj teamoj

Pli ol du jarojn daŭris la konkurado en la Esperantista Ŝak-Ligo Internacia (ESLI) en koresponda ŝako. Nia lando partoprenis per du teamoj — „Sofio“ kaj „Ĉavdar“ en grupo „C“. Ili montriĝis ĉefaj konkurantoj por la I-a loko, kiu donus rajton partopreni en grupo „A“ de la III Teamturniro. Post tre interesaj ludoj ĉiuj 4 partioj inter niaj du teamoj finiĝis per remio 2:2. Kontraŭ alilandaj teamoj „Sofio“ akiris notindajn venkojn. „Ĉavdar“ ankaŭ gajnis kontraŭ ĉiu jaliaj teamoj. Neniu el niaj teamoj malgajnis eĉ unu partion. Finaj rezultoj:

Haĝivanov	4	venkojn	2	remiojn	5	poentojn
Vojnov	4	„	2	„	5	„
Kanev	5	„	1	„	5,5	„
Stoimenov	3	„	3	„	4,5	„

Teamo				
„Sofio“	16	„	8	„ 20 „
Kânĉev	2	venkojn	4	remiojn 4 poentojn
Evtimov	3	„	3	„ 4,5 „
Ĉolakov	3	„	3	„ 4,5 „
Vlaĥov	3	„	3	„ 4,5 „

Teamo			
„Ĉavdar“	11	„	13 „ 17,5 „

Kontraŭ aliaj teamoj la nialandaj atingis jenajn rezultojn:

„Sofio“ kontraŭ:		„Ĉavdar“ kontraŭ:
Dinamo ĈS	4:0	4:0
Bohemio ĈS	3:1	2,5:1,5
Francio/Hispanio	4:0	3,5:0,5
Rumanio „B“	4:0	3:1
Hungario „B“	3:1	2,5:1,5

Teama finklasifiko

1. „SOFIO“	20 poentojn
2. „ĈAVDAR“	17,5 „
3. HUNGARIO „B“	12,5 „
4. BOHEMIO ĈS	12,5 „
5. RUMANIO „B“	10 „
6. FRANCIO/HISPANIO	6,5 „
7. DINAMO ĈS	2 „

Noto: Hungario „B“ havas 2 nefinitajn partiojn, Bohemio kaj Rumanio — po 1.

Jam komenciĝis la ludo en la III Teamturniro. Bulgario partoprenos ĝin per 6 teamoj. Al ĉiuj ni bondeziras sukcesan ludon!

Ivan Vojnov

K O R E S P O N D U K U N J U N A J E - I S T O J E L Z A G R E B !

En Zagreb (Jugoslavio) jam du jarojn ekzistas Organizo de Junaj Esplorantoj, en kiu membras plejparte studentoj el la universitato. Ĝi konsistas el multaj sekcioj, inter kiuj ankaŭ Esperanto-rondeto. La rondeton gvidas instruisto Joĉjo Suriĉ. Ĉe ĝi funkcias E-kurso. La kursanoj ege deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Skribu al ili kaj vi certe ricevos respondon kaj proponon pri individua korespondado laŭ via prefero.

Komuna adreso : OMI—Esperanto-rondeto (por Joĉjo), Savska 25/I, 41 000 Zagreb, Jugoslavio.



De la 18a ĝis la 27a de majo en la ĉefurbo de Bulgario okazis universala filatela ekspozicio „Filaserdika-79“. Ĝia devizo estis: „La filatelo en servo de la paco!“ Filatelistoj el pli ol 130 landoj de ĉiuj kontinentoj prezentis siajn kolektojn. En agrabla etoso oni interŝanĝis opiniojn pri diversaj filatelaj problemoj, komenciĝis novaj amikaj rilatoj inter ĝis nun nekonataj homoj.

Aparte grava por la e-istoj estas la fakto, ke dum la tagoj de „Filaserdika-79“ okazis la unua E-simpozio en la historio de la tutmondaj filatelaj ekspozicioj. La ĉeestantoj aŭdis tri prelegojn: „La poŝtista administracio en Bulgario kaj Esperanto“ de Draguŝko Petrov, „Bulgaraj eminentuloj — amikoj de Esperanto“ de Katja Maneva kaj „La disvolviĝo de la Internacia Lingvo sur la poŝtmarkoj“ de inĝ. Bojdar Leonov.

Ĉiuj tri prelegintoj estis el Bulgario. Post la prelegoj okazis aktiva diskutado,

kiun partoprenis e-istoj el Portugalio, Norvegio, Sovetunio, Bulgario. La simpozianoj esprimis fortan deziron, ke E-simpozioj okazu ankaŭ en la estontaj tutmondaj filatelaj ekspozicioj.

Enkadre de „Filaserdika-79“ al la temo Esperanto estis dediĉita ankaŭ konvena loko. Aparte notinda estas la riĉa kolekto de s-ano Vladimir Vana el Pilzen, Ĉeĥoslovakio. Ĝi entenis rarajn filatelajn materialojn pri la E-movado, inter kiuj ankaŭ malnovajn kaj maloftajn kovertojn stampitajn per specialaj stampiloj de la unuaj UK de E-o.

La E-simpozio kaj la E-ekspozicio enkadre de „Filaserdika-79“ montris, ke E-o povas kuraĝe penetri en la mondan filatelan movadon kaj okupi indan lokon, donante sian obolon en la internacia kultura konkurado kaj en la laboro por paco, amikeco kaj kompreniĝo inter la popoloj.

Ljuben Grozdanov

Inĝ. Panajot Kurdalanov,
vicministro de komunikoj

VIZITKARTO DE BONA VOLO*

Post la liberiĝo de Bulgario el sub osmana jugo la rusa civila regado metis la fundamentojn de poŝta administracio en nia lando kaj la 1-an de majo 1879 transdonis ĝin al la bulgara potenco.

La saman daton estis emisiitaj la unuaj bulgaraj poŝtmarkoj. Laŭ mendo de la rusa poŝta administracio ili estis presitaj en la presejo por valorpapiroj en Peterburgo. La markoj estis 5 kaj ilia valoro fiksita en centimoj kaj frankoj, ĉar en Bulgario ankoraŭ ne estis akceptita nacia monunuo. Ankaŭ nun ili estas konataj inter la kolektantoj sub la nomo „centimoj“.

En Rusio estis presitaj ankoraŭ du serioj de bulgaraj poŝtmarkoj — „La unuaj ŝtorkvaloroj“ kaj „Granda leono“.

Ĝis la komenco de nia jarcento kiel temo de la bulgaraj poŝtmarkoj estis uzata la leono el la ŝtata blazono. Iom poste kiel temo altrudiĝis la personeco de la monarko. Bulgario estas unu el la unuaj landoj en la mondo, kiuj rompis tiun ĉi tendencon per la eldono de kelkaj serioj de poŝtmarkoj, notantaj gravajn eventojn en la historio de nia popolo. La unua memoriga serio de poŝtmarkoj en nia lando estis eldonita en 1901 j. lige kun la 25a datreveno de la Aprila Ribelo. La sekvan jaron serio estas dediĉita al la epopeaj bataloj apud Sipka. Duafoje tiu ĉi sankta por la bulgara popolo evento estas tuŝita de la poŝtmarkeldonado

en 1934 j. lige kun la inaŭguro de la memormonumento de Sipka. Ankoraŭ kelkaj serioj — lige kun la 50-jariĝo de la pereco de Hristo Botev, la 70-jariĝo de la morto de Ivan Vazov, „La ribelo de Velĉo“ kaj „Kiril kaj Metodij“ — notas apartajn eventojn el la 1300-a historio de Bulgario.

Post la Naŭa de Septembro 1944 j. la grandegaj ŝanĝoj en ĉiuj sferoj de la politika, ekonomia kaj kultura vivo de la lando speguliĝas ankaŭ en la poŝtmarkoj. Laŭ la diversaj ekonomiaj temoj estas videbla la rapida evoluo de la industrio kaj agrikulturo, intime ligita kun la frata helpo, kunlaboro kaj ĉiuflanka integriĝo kun Sovetunio kaj la landoj de la socialisma komunismo. Inter la markoj, dediĉitaj al la frata amikeco kun USSR, unuan lokon okupas la marko, eldonita en 1977 okaze de la honorigo de Leonid Breĵnev per dua ora stelo de „Heroo de PR Bulgario“. Laŭ la poŝtmarkoj oni povas sekvi la paŝojn de nia historio, la batalojn de nia popolo por libero. Sur multaj markoj estas videblaj la figuroj de plej bonaj bulgaraj gefiloj, donintaj sian vivon en tiuj bataloj.

Sur notinda kvanto de bulgaraj poŝtmarkoj estas videblaj la figuroj de elstaraj agantoj de nia kaj de la monda kulturoj. Multaj poŝtmarkoj spegulas la belaĵojn de nia lando, de ĝiaj multnombraj maraj kaj montaj turismaj objektoj. La ŝatantoj de la sporto povas laŭ la markoj vidi la partoprenon de la bulgaraj sportistoj en olimpikoj

* *Kun etaj mallongigoj.*

kaj mondaj konkuradoj, ekscii pri la mult-
nombraj sportaj aranĝoj ĉe ni.

Serioza rekono de la arta kvalito de niaj
poŝtmarkoj estas la aljuĝo de la ĉiujara
granda premio de la franca filatela salono en
1974 j. pro la serio „Juneco 74“, dediĉita al
la Monda Junulara Filatela Ekspozicio,
okazinta en majo samjare en Sofio.

Oni povas noti grandan intereson ekster-
lande al la bulgaraj poŝtmarkoj, pro kio ili
fariĝas pli kaj pli serĉataj de la filatelistoj
en multaj landoj. Tion pruvis ankaŭ la

monda filatela ekspozicio „Filaserdika 79“,
kiu altiris la atenton de plej elstaraj kolek-
tintoj de poŝtmarkoj el la tuta mondo.
Apartan gravecon havas la eldiro de k-do To-
dor Jivkov lige kun „Filaserdika 79“: „La
kolektado de poŝtmarkoj donas bonegajn
eblecojn por konatiĝo kun la historio, eko-
nomio kaj vivmaniero de la popoloj...
En tiu senco la poŝtmarko estas vizitkarto
de bona volo, kiun homoj el ĉiuj kontinen-
toj interŝanĝas.“

POEZIO kaj BELARTO

Ljudmila Jeusejeva

PATROLANDO

Vi — mia vivo, mia ĉio,
nur poezi', sen ajna proz',
unua kaj la lasta spiro,
labor' benata kaj ripoz'.

Vi — mia ĝoj', feliĉo mia,
aromo de printempa vent',
impona, firma citadelo,
sub hela, paca firmament'.

Mi vin ekstaze, tero, kisas,
vin — mia revo, mia am'.
Neniam estingiĝu glora
de via flag' aŭrora flam'!

Usin Kerim

MONUMENTO

Al Diĉo Petrov

Tagnokte preterpasas aŭtoj —
anhele, en senfina ĉeno.
Jen neĝas, jen birdetoj kantas —
li staras ĉiam sur posteno.
Kuraĝa, granda, gardostaras
li post la dignoplana fino.
Momenton haltu! Jen rakontas
pri li la branĉoj de la pino.

El la bulgara: Asen Griogrov

Rajna Konstantinova

LA ETA RUĜA ALBUMO*

Paĝoj el mia vivo

Mi ofte tenas en la manoj la etan
ruĝe binditan albumon. Ĝi entenas
dek tri fotojn, kiuj rakontas pri la
mallonga, suferplena vivo de mia
fratineto Miĉe. Ĝi memorigas al mi
ankaŭ pri mia propra suferplena vivo

kaj pri la vivo de mia 93-jara patri-
no, kiu jam delonge estas katenita al
la lito, kaj rememoroj pri pasintaj
suferoj ne plu turmentas ŝin...

La unua bildo montras dolĉan du-
jaran knabineton en lito. Ĵus veki-

* La verko estas premiita en la Belartaj Konkursoj dum la 63 UK de E-o en Varno 1978.
Ni publikigas ĝin kun permeso de UEA.



ĝinte, ŝi afable ridetas. Ŝi apogas sin sur la kuseno per sia maldekstra kubuto. La ĉielbluaj okuloj brilas sub la ornamo de blondaj haroj. Kiu ŝi estas? Al kiu ŝi ridetas? Mi enprofundiĝas en rememoroj. . .

*

Mia patro estis majstro-masonisto. Li multe laboris kaj bone gajnis. Ĝis la kvina vivojaro mi havas feliĉajn rememorojn. Lumo- kaj floro-plena dometo kun puraj fenestroj kaj freŝe lavitaj kurtenoj. Pitoreska florgardeno, ĉirkaŭita de fruktarboj. Kaj ses bluokulaj, blondharaj infanoj. . .

Nigra kurteno dividas tiun tempon disde la sekvanta.

*

La feliĉo iom post iom malaperis de nia hejmo. Paĉjo komencis eliri frue kaj reveni malfrue, trista, silenta, fojfoje ebria. Tage panjo ofte ploris, sed kiam li revenis, ŝi surmetis maskon de senzorgo kaj gajeco kaj kuraĝige parolis al li. El iliaj interparoloj ni komprenis, ke paĉjo perdis sian laboron.

Panjo komencis dum la noktoj lavi soldatan tolaĵon malgraŭ la protestoj de paĉjo, kiu ofte plorgemis: „Kia viro mi estas, se mi ne povas nutri mian familion! . . .“ — „Kuraĝon, kara edzo! — panjo ordinare respondis. — Ĉio aranĝiĝos!“

*

Estis antaŭ la Paskofesto. Mi, kiel ordinare, sidis inter la branĉoj de la floranta cidoniarbo kaj kantis. Panjo kalkis la murojn. Subite mi vidis la vitejgardiston. Li kuris kaj ion kriis. Mi perceptis la vortojn: „Najbarino, baj Angel pendigis sin! . . .“

Mia patrino laŭte ekploris. Baldaŭ oni transportis mian patron hejmen — timige li aspektis. . . El lia poŝo videbliĝis blanka folieto. Iu voĉlegis: „Pardonu al mi, kara edzino, kaj vi, infanoj. Ankaŭ dio min pardonu,

ĉar li scias, ke mi estas senkulpa. Kalumnio senigis min je mia laboro. Miaj fortoj jam elĉerpiĝis. Mi ne plu povas rigardi vin kaj la infanojn malsatadi. La homa maljusteco frakasis min. Dio vin protektu!“

*

Oni enterigis paĉjon. Panjo surmetis nigrajn vestojn, kiujn ŝi neniam plu demetis. . . Nokte ŝi lavis abomenindan soldatan tolaĵon, kiu, kune kun la fiodora sapo, tiel plenigis la ĉambregon per haladzo, ke ni ĉiuj tuis kaj preskaŭ sufokiĝis. Tage ŝi laboris ĉe fremdaj homoj. Ni estis ses gefratoj (unu fratineto estis jam mortinta). Plej aĝa estis mia kormal-sana frato — dek ses jara, plej juna mia fratineto Miĉe — unujara. La du pli aĝaj fratinoj estis lernantinoj. Hejme mi estis „plej aĝa“ inter la infanoj, do mi devis zorgi pri la malsana frato kaj pri la du fratinetoj.

Iun matenon, dum la fratinetoj matenmanĝis, mi iris en la apudan ĉambron, por doni al la frato kuraĉilon. Subite mi aŭdis mian trijaran fratinon kii: „Miĉe brulas!“ Rapide mi eniris la ĉambron kaj vidis, ke la blonda hararo de Miĉe estas en flamoj. . . Alkuris la najbarinoj kaj estingis la flamojn. Iu estis avertinta panjon, kaj ankaŭ ŝi rapide venis. Per larmoj la trijara fratino rakontis, ke kiam ŝi ekdeziris preni de Miĉe ŝian arĝentan kulereton, donacitan de paĉjo por ŝia unua naskiĝtago, Miĉe provis „kaŝi“ ĝin en la malaltan ladan forneton, la flamoj tuŝis ŝiajn harojn kaj. . .

Panjo multe prolis. Mi aŭdis najbarinojn konvinkadi ŝin fordoni la infanon al iu riĉa seninfana familio. Sed panjo obstine rifuzadis.

*

Estis la vespero antaŭ Kristnasko. Per siaj modestaj rimedoj kaj parte propramane panjo estis preparinta donacetojn por ni ĉiuj — pupojn el

ŝtofo, gantojn por la pli aĝaj. Eĉ malgranda arbeto ne mankis. Odoris je freŝa pano kaj tavolo kukko. Kviete festa etoso regis en la malriĉa ĉambro.

Subite apud la pordo aŭdiĝis aŭtomobilsignalo. Panjo paliĝis, rapide kruksignis kaj malfermis la pordon. La ĉambron eniris geedza paro — grandstaturaj, elegante vestitaj viro kaj virino, kiuj enportis kun si neĝerojn, malvarmon kaj odoron je luksa parfumo. Ili tenis mane grandajn paketojn kaj afable ridetis. La viro diris: „Nu, infanoj, jen venis al vi Djado Koleda (Avo Frosto). Por ĉiu el vi mi portas donacon. Sed la plej obeema ricevos la plej grandan pupon en la mondo. Kiu estas plej obeema?“ — „Mi!“ — Miĉe rapide kaj senhezite prononcis. La viro diris: „Bone, se vi estas la plej obeema, venu kun ni al la aŭto, kaj vi ricevos la pupon. Tremante la tuta, ne elparolinte eĉ vorteton, panjo vestis Miĉe en ŝia eluzita manteleto kaj eliris kun la gastoj. Aŭdiĝis signalo, infana krio, kaj...

Panjo revenis en la ĉambron sola, ŝanceliĝanta, kun okuloj ŝvelintaj pro larmoj. Mia malsana frato, kiu preskaŭ neniam ellitiĝadis, nun staris ĉe la pordo inter la du ĉambroj kaj konsternite demandis: „Panjo, kio okazis? Kie estas Miĉe?“

Panjo ĵetis sin sur la plankon, metis la manojn sur la kapon kaj ek-kriis: „Ho vi, miaj povraj infanoj! Miĉe neniam plu revenos!... Mi fordonis ŝin!“

En tiu kristanka vespero kvin georfoj kaj ilia de la vivo frakasita patrino amare ploris kaj ne tuŝis la donacojn...

En tiu festa nokto en fremda aŭto viva dujara pupo forĵetis la grandan pupon, per kiu oni allogis ŝin, ĵetis sin kontraŭ la vitrojn de la aŭto kaj vokis per raŭka voĉeto sian panjon, siajn gefratojn...

*

Post tempo ni eksciis, ke kiam la familio atingis sian urbon, Miĉe ne deziris eliri el la aŭto, nur ripetadis: „Mi volas panjon!...“ Multajn tagojn ŝi ploris, nenion manĝis, nek trinkis, ekdormis nur pro plena elĉerpiĝo de la fortoj. La geedzoj jam decidis redoni ŝin al panjo, ĉar ekzistis danĝero, ke ŝi mortos. Kiam tamen iumaterie la virino eniris la ĉambron kun intenco prepari Miĉe por la vojaĝo, Miĉe, ĵus vekiĝinta, etendis la brakojn, ridetis kaj karese diris: „Panjo!...“ Ege surprizita, la virino esploris pro kortuŝo kaj tuj vokis sian edzon. Sed Miĉe ne nomis lin „paĉjo“, ĉar tiu alparolo estis al ŝi nekonata — ŝi ne plu memoris la patron. En tiu grava por ili momento ili fotis Miĉe kaj poste sendis al ni foton.

Jen tion rakontas al mi la unua foto...

*

Kaj kio okazis intertempe al ni, la georfoj?

Mi plue zorgis pri mia malsana frato kaj pri la pli juna fratinego. La stato de mia frato pli kaj pli malboniĝis. La korpo ne plu povis eligi la akumuliĝintan akvon. La kuracisto faris tion kirurgie. Dum kelkaj tagoj mia frato sentis faciligon. Iun fojon, ĉe sunsubiro, li petis: „Rajnjo, donu al mi la fluton!“ Kaj li komencis ludi — tiel kortuŝe, tiel majstre, ke la najbarinoj, kiuj venis sub la fenestron por lin aŭskulti, skuis la kapojn kaj flustris: „Povra junulo, kial li devas morti?...“

Iutage la kuracisto trovis mian fraton ludanta per la fluto. „De kiu estas tiu komponaĵo, kiun vi ludas?“ — li demandis. — „De mi, sinjoro doktoro!“ — mia frato modeste respondis. La doktoro diris al panjo, ke li posedas grandan talenton. Kaj samtempe li diris, ke li faris por ŝia filo ĉion, kio estas en la homaj ebloj. De nun



plu nur dio povus helpi lin. . . Panjo laŭte ekploris kaj diris: „Sinjoro doktoro, mi posedas nur tiun ĉi dometon. Mi fordonos ĝin, nur trovu savon por mia filo!“ Aŭdinte la vortojn de panjo, mia frato diris: „Ne fordonu la dometon, panjo, ĉar mi jam estas vojaĝanto al alia mondo. . . kie ne estas malsanoj kaj angoro, nek sopirĝemoj, sed vivo eterna. . .“ La lastajn vortojn li mallaŭte elkantis en eklezi-slava lingvo. . . Panjo metis la manojn sur la vizaĝon kaj plue senkonsole ploris.

La saman tagon posttagmeze, kiam mi direktis al mia frato la kuleron kun kuracilo kaj diris kiel ordinare: „Jen, fraĉjo, trinku!“ — li ne respondis. Lia kapo kuŝis sur la maldekstra ŝultro. Pro sia malsana koro kaj ŝvelinta korpo li lastatempe ne povis kuŝi, nur duonsidis en la lito. „Li certe dormas“, mi ekpensis kaj ekatendis. Ho, kiom ŝvelintaj estas liaj kruroj, mi pensis. Subite mi konstatis, ke sub la streĉita haŭto estas aperintaj ruĝaj kaj blankaj makuloj, simile al ŝaktabulo. Mi ektimis, ekrigardis lian vizaĝon de proksime. . . Li ne plu spiris. . . La duonfermitaj okuloj estis glacie senmovaj. . . „Fraĉjo mortis!“ — mi terurigite ekkriis.

Denove venis la samaj najbarinoj, atestantinoj de ĉiuj niaj tragedioj. . .

Pli malsupren mallevis panjo la nigran tukon, pli frue ŝi komencis eliri matene por surverŝi per akvo kaj larmoj tri tombojn antaŭ ol iri al laboro. . .

*

Mi foliumas la etan ruĝan albumon plu. Jen la dua foto. Ĝi montras Miĉe, jam sesjara, en brodita silka robo. Ŝi apenaŭ rimarkite ridetas. Apud ŝi staras du infanoj, pli junaj ol ŝi. Knabo kaj knabino. Jes, en la familio estis okazinta io vere stranga. Post dek sep jaroj da seninfaneco, post kiam ili prenis Miĉe la virino en daŭro de tri jaroj naskis du infanojn.

Tiu ĉi foto estas ligita por mi kun rememoro pri grava evento: Miĉe vizitis nin unuafoje post la disiĝo. La gepatroj decidis konatigi ŝin kun la „onklino“ kaj la „kuzinoj“.

Nu, en tiu — denove antaŭpaska — tago ni sidis en la ĝardeno. Mia plej aĝa fratino, jam instruistino en fora vilaĝo, estis reveninta por la paskaj ferioj kaj ion brodis. La alia, gimnazianino, legis libron, panjo fosis la florbedojn, mi kaj la pli juna fratineto manĝis panon kun marmelado. Aŭdiĝis aŭtomobilsignalo. Ah! Mi tiel malamis ĝin depost tiu kristnaska vespero, kiam oni forprenis Miĉe de ni!

La korton eniris la sama geedza paro — altstaturaj, bonodoraj, lukse vestitaj. Sed ili ne estis solaj. Inter ili gracie paŝis Miĉe, ĉarma kiel pupo. Mia koro ekbatis forte. La plej aĝa fratino donis signon per fingro sur la buŝo, ke mi silentu, kvazaŭ mi ne konus la fratineton.

La virino diris: „Miĉe, jen tio estas viaj kuzinoj, kaj tiu ĉi — via onklino. Donu al ŝi manon!“ Miĉe unue afable etendis manon, sed tuj rapide kaŝis ĝin malantaŭ la dorson. „Ŝiaj manoj estas oleoŝmiritaj kaj ŝi malpurigos mian novan robon!“ — obstine diris Miĉe. Konfuzite panjo metis la manojn sub la antaŭtukon. La virino diris al Miĉe, ke la fingroj de la onklino estas ŝmiritaj per vazelino, ĉar ili difektiĝis pro multa lavado. „Ĉu ili ne havas servistinon?“ — demandis la naivaj lipoj. . .

Panjo kaj la gastoj eniris la ĉambron, Miĉe restis kun ni en la korto. Ŝi ekdeziris manĝi panon kun marmelado kaj rapide kutimiĝis al niaj kondiĉoj. Antaŭ ol forveturi ŝi dorloteme diris: „Panjo, mi volas baldaŭ denove veni al la kuzinoj. . .“

Kiam ili eniris la aŭton, Miĉe ne plu ploris kiel antaŭ jaroj. Ŝi salute svingis tra la fenestro sian molan manon. La bluaj okuloj kaj rozkoloraj lipoj dolĉe ridetis. La tempo estis forviŝinta ĉiun rememoron pri ni.

*

La tria foto en la eta ruĝa albumo montras Miĉe lernantino, kune kun la gefratoj. Varme vestita en vintramantelo, kun luksa pelto ĉirkaŭ la kolo, sur la silka hararo ĉapelo kun alta periferio. La pala vizaĝo estas trista. La larĝe malfermitaj okuloj rigardas ien, plenaj je doloro. . .

Tiu ĉi foto memorigas al mi pri la aflikto, kiun Miĉe travivis, kiam ŝi fariĝis lernantino. Pri tio skribis al ni la patrino. Ŝi iris kun Miĉe al la lernejo. La instruistino demandis pri ŝia nomo. Miĉe diris ĝin. La instruistino asertis, ke en la dokumentoj estas alia familia nomo. „Sed tio ne eblas! Panjo, diru do al la instruistino, ke tio estas ia eraro!“ La patrino kulp-miene karesis la kapon de Miĉe kaj nenion diris. Sur la strato ŝi klarigis al la infano, ke ili prenis ŝin de tiu onklino, ĉar kiam la patro mortis, ili restis ses georfoj, ne estis pano por ĉiuj. . . Miĉe rigardis ŝin konsternite kaj mekanike ripetadis: „Ne estis pano por ĉiuj. . .“

Kiam ili eniris la riĉan domon, Miĉe malaperis. Kvar tagojn kaj noktojn oni ne povis trovi ŝin, eĉ dubis, ĉu ŝi eniris la domon. La polico intervenis, demandis ankaŭ en nia urbo, sed atente, por ke panjo ne komprenu. Je la vespero de la kvara tago, kiam la servistino ion serĉis en la subtegmentejo, ŝi trovis Miĉe tie, en la plej malluma angulo, malvarma kaj senkonscia.

Longe daŭris la barakto inter vivo kaj morto. Kiam Miĉe estis en stato interparoli, la patrino klarigis al ŝi denove ĉion kaj diris ankaŭ, ke kiam venis la aliaj du infanoj, ili ne adoptis ŝin. Do Miĉe decidu — ĉu ŝi volas reveni al sia vera familio aŭ ne. Miĉe iom meditis, poste decide diris: „Ne! Se por la aliaj kvin gefratoj estis pano, nur por mi ne, mi restos tie ĉi, kie estas sufiĉe da pano por ĉiuj!“ La povra orfo ne povis scii, ke ne tiom la manko de pano, kiom la neebleco

kreskigi kaj eduki ŝin devigis panjon fordoni ŝin kaj resti malfeliĉa dum sia tuta vivo. . .

*

Miĉe resaniĝis, komencis viziti la lernejon, fariĝis gimnaziano. Sed ŝi neniam plu vizitis nin, nur de tempo al tempo sendis al ni donacetojn. Ŝi vizitis komercan gimnazion. La patro preparis ŝin por librotenistino en sia fabriko. Tia montras Miĉe la kvara foto. La grandaj bluaj okuloj esprimas fizikan kaj psikan suferon. Anstataŭ ripozi aŭ promeneti post preparo de la lecionoj ŝi devis ĝis malfrua nokto enskribi kontajn operaciojn. Ni eksciis, ke ŝi havas senĉesajn kapdolorojn kaj perturbojn en la vidpovo. La okuloj, konsumiĝintaj pro larmoj, apenaŭ eltenis la streĉitecon.

La kvina foto montras la tutan familion — la gepatrojn, la gefratojn kaj Miĉe, kies dikaj harplektaĵoj estas levitaj supren, simile al peza ora krono. Kaj ĉiam la sama malgaja mieno kaj tristaj, neridetantaj okuloj. . .

*

Kia estis intertempe la situacio ĉe ni? Malgraŭ la mizero kaj la manko de vivrimedoj unu post alia ni ĉiuj finis la gimnazion. Mia patrino, kiu kuraĝe rifuzis al ĉiuj kandidatoj edziniĝi, sukcesis sola plenumi sian revon. La du pli aĝaj fratinoj estis instruistinoj en foraj vilaĝoj — ja ankaŭ la privilegio profesii ĉe pli favoraj kondiĉoj apartenis al la riĉuloj. . . La pli juna fratino fariĝis tajpistino. Mi komencis labori kiel korektistino en presejo. Samtempe mi prezentis dokumentojn al la t. n. „Inspekcio por Enoficigo de Senlaboraj Intelektuloj“ kaj ekatendis. . .

En tiu tempo mia vivovojo estis jam lumigita de la verda stelo. Kiel okazis tio? — Jam antaŭ jaroj, kiam mia frato mortis, en lia „heredaĵo“, konsistanta el la fluto kaj lignokesto kun liaj propraj libroj, troviĝis mal-



granda malnova libreto. Mia pli aĝa fratino, kiu jam konis la latinan alfabeton, legis: „Plena manokonduko por la ellernado de la Lingvo Internacia Esperanto. . . Plovdiv, ŝtata presejo „Trud“, 1900 j.“ Tiam ŝi ŝerce diris: „Tiu ĉi libro restos por vi, ĉar vi ĉiam ion babilas, kvazaŭ en fremda lingvo.“ Do, la libro restis ĉe mi. Pli poste mi konjektis, ke eble mia frato lernis aŭtodidakte Esperanton. Ĉar mi rememoras, ke kiam lin vizitis liaj samklasanoj kaj demandis: „Nu, Miĥail, kiel marŝas la studado?“ — li heziteme respondis: „Marŝas. . .“

Kiam mi fariĝis gimnaziano kaj eklernis latinan kaj germanan lingvojn, mi fojfoje foliumis la etan libron, sed ne okupiĝis serioze pri ĝi. Ĉio ŝanĝiĝis abrupte, kiam en la lasta klaso de la gimnazio en 1938 j mi legis anoncon, ke estas malfermata kurso de Esperanto sub la gvido de sinjoro Ilija Silvestriev, patro demiasamklasano kaj amikino Sofka, kiun la gepatroj nomis „Sonjo“. Mi aliĝis al la kurso kaj eklernis kun granda entuziasmo. Sed, bedaŭrinde, oni baldaŭ malpermesis la kurson, ĉar ĝin vizitis plejparte ideoj progresemaj lernantoj.

*

Iun tagon venis al mi najbarino, kiu ekde mia infanaĝo partoprenis ĉiujn gravajn eventojn en mia vivo. Ŝi tenis mane ĵurnalon kaj kriis de malproksime: „Vi estas enoficigita en Sofio!“ En la ĵurnalo troviĝis longa listo kun nomoj de junuloj, distribuitaj de la Inspekcio en diversajn urbojn.

Antaŭ ol forveturi Sofion mi vizitis Miĉe laŭ ŝia invito. Tio estis nia dua intervidiĝo. Mi ĝojis, ke mi povos rakonti al ŝi pri la cirkonstancoj, kiuj devigis panjon fordoni ŝin.

*

Mi ne povis satĝui la aspekton de Miĉe, aparte la fascinajn harplekta-

ĵojn — senmortigitajn sur la sesa foto.

Mi rakontis al Miĉe pri la tago, kiam ŝi apenaŭ ne forbrulis, kaj pri la suferoj de panjo. Miĉe komprenis kaj pardonis. Ŝi rakontis al mi pri siaj problemoj, pri la neelteneblaj kapdoloroj kaj perturboj en la vidpovo. Iuj kuracistoj supozis, ke tion kaŭzas la dikaj harplektaĵoj, kaj konsilis al ŝi tranĉi ilin. Sed ŝi ankoraŭ hezitis. . .

*

Dronante en rememoroj, mi plue foliumas la etan ruĝan albumon. Jen malgranda amatora foto — la sepa. La nura, sur kiu Miĉe large, feliĉe ridas. Plena rideto, kiu malkovras perlosimilajn dentojn kaj tiel mirinde ŝanĝas la palan vizaĝon! Ŝi estas kun siaj geonkloj kaj gefratoj, en la Nigra Maro mem, ĝis la brusto en akvo. Ŝia unua kaj lasta feriado! Ho, la vivo estas vivinda! — kvazaŭ parolas la dolĉa buŝo. . .

*

Sur la oka foto Miĉe estas jam sen harplektaĵoj. Ŝi oferis ilin por sin savi de neelteneblaj kapdoloroj. Sed vane: la kapdoloroj ne nur ne ĉesis, sed kontraŭe — plifortiĝis.

*

La sekvan jaron ni denove intervidiĝis. Oni venigis ŝin en Sofion, al la kliniko de fama oftalmologo. Sekvis peza kuracado — elektrolizo, salaj injektoj, — sed ĉio estis senrezulta. Ĉiutage post la laboro mi vizitis ŝin, legis al ŝi, mallaŭte kantis, ion rakontis. La gepatroj havis nenion kontraŭ tiu ekfloranta inter ni fratina amo. Iu devis zorgi pri Miĉe — kiu farus tion pli sindediĉe ol la propra fratino?!

La kuracistoj ne estis unuanimaj pri la diagnozo — ĉu tumor, kiu premas la cerebelon, ĉu malrapida degluado de la retino. La gepatroj venigis faman oftalmologon el Vieno. Li decidis fari trepanadon de la kranio.

Tio estis terura, mi ne forgesos ĝin ĝis la fino de mia vivo!

*

Vanaj estis la suferoj de la povra Miĉe. Ankaŭ la trepanado ne mildigis la suferojn, ne plibonigis la vidpovon. Ne estis tumor. La kuracistoj konsilis, ke ŝi edziniĝu kaj nasku — eble tio purigos la sangon. Feliĉe aperis ankaŭ konvena kandidato, ili sincere ekamis unu la alian. La naŭa oto montras la gefianĉojn. La haroj de Miĉe post la trepanado ne estas sufiĉe elkreskintaj. Eĉ la lerta hararangŝo ne mildigas la impreson.

Estis la vintro de 1942 — severa militempa vintro! Miĉe invitis min ĉeesti la geedziĝan ceremonion. Ho, kiel ĉarma ŝi estis! Blanka simfonio! Tia montras ŝin la deka foto. Ŝi tenas mane grandan bukedon da kalaoj. Ora kruco brilas sur ŝia brusto — la kruco de ŝia mallonga martira vivo. Nek dio, nek homoj savis ŝin de suferoj. Nur la morto savis ŝin. . . .

*

La dekunua foto montras la junajn geedzojn inter parencoj. Liaj parencoj, mi ne konas ilin. Ŝia parencino estas nur mi. Kaj, kompreneble, la gepatroj kaj ties parencoj. Kvietaj kaj dankaj estas ŝia mieno. Ŝi esperas esti feliĉa apud sia bona, sindediĉa edzo.

Sed la doloroj ne ĉesis, la vidpovo ĉiam pli kaj pli malaperis. Miĉe graviĝis kaj unu jaron post la edziniĝo naskis knabeton. Oni anticipe avertis min kaj mi tuj forveturis. Ho ve! La de ŝi kaj de ni ĉiuj senpacience atendata tago de la nasko alportis kun si novan, teruran malfeliĉon: Miĉe tute blindiĝis! Ŝi neniam vidis sian infanon. Ŝi kaj ni ĉiuj ploris senkonsole. La bluaj okuloj, ĉiam tiel belaj, ne plu perceptis la helan mondon.

Semajnon post la nasko la edzo forveturis kun ŝi al Vieno, al la sama oftalmologo, kiu faris la trepanadon.

Tutan jaron ili restis tie, sed senrezulte!

*

Kortuŝa estas la dekdua foto! Ĝi prezentas Miĉe, la edzon kaj la ore blondan unujaran filon, kiu brilas sur ŝiaj genuoj, sur la fono de la malhela robo, simile al pupo el oro. Ŝiaj silkaj haroj ondforme atingas la ŝultrojn. Sur la brusto oras la granda kruco. Sur la lipoj estas eĉ aludo pri rideto — „La rideto de la blinda Monna Liza“ — tiel mi nomas tiun ĉi foton. La okuloj estas ĉarmaj kiel ĉiam, sed ili estas mortaj por la hela lumo!

Konekse kun tiu bildo mi rememoras la tagon, kiam en ŝia kaj en niaj koroj aperis efemera espero, ke ŝi denove reakiros la vidpovon. . . . Mi vizitadis ŝin ĉiusomere, dum la forpermeso. Kaj jen mi denove estis ĉe ŝi. La knabeto — sesjara. Mi legis ion al li en la florgardeno. Miĉe malrapide marŝis sur la ŝtona vojeto en la korto surkrestita de herbo kaj pitoreskaj floretoj. Subite ŝi ekstaris kaj ekkriis: „Rajno, mi vidas!“ Rapide mi alproksimiĝis kaj kun tremanta koro ekrigardis en la direkto de ŝia rigardo. . . . Inter la ŝtonoj akre brilis tondilo. . . . „Miĉe, kion vi vidas?“ — mi demadis. „Mi vidas, ke io brilas tie!“ Ŝi rapide alproksimiĝis kaj levis la tondilon per mano. El ŝiaj okuloj fluis larmoj. Ŝi kruclis kaj kisis sian oran krucon. Venis ĉiuj hejmanoj, oni avertis la edzon, kiu per larmoj rakontis, kion diris la oftalmologo el Vieno: ke estas okazoj, kiam ĉe naturkonforma vivo, post jaroj la retino denove gluiĝas. Ĉu jam estis veninta tiu ĉi momento?! Ve! Vana estis nia ĝojo! La resto de ŝia juna martira vivo ne sufiĉis, por ke la naturo faru sian miraklon! La sekvan jaron, 26-jara, Miĉe mortis en teruraj suferoj pro cirozo de la hepato.

. . . Jen antaŭ miaj larmoplenaj oku-



loj la dektria — lasta foto. Lasta en la albumo, lasta ankaŭ por Miĉe, ĉar ŝi kuŝas en ĉerko. . . Malgranda amatora foto, enhavanta tiom da homa sufero! Fermitaj estas por ĉiam la multsuferintaj okuloj. La oraj h aroj fariĝis arĝentaj dum la agonio —

Veselin Hanĉev

RINGO

Pro via silenta alveno, kiu
klel tondro ankoraŭ sonas en mi,
pro ĉio donita kaj ne reprenita de vi,
pro viaj pardonoj, ke mi estas kaj ne estas
kun vi,
pro la vortoj, iufoje ŝparitaj,
kaj pro la karesoj, kiujn ne ŝparis vi,
pro la forto, de vi al mi donita,
kiam plej malforta estis vi,
pro tio, ke al mi destinita
estis ĉiu via — bona kaj malbona nor' —
anstataŭ ringo sur la fingron etan vian
miajn varmajn lipojn metas mi.

El la bulgara: Elena Kalinkova

Rasul Gamzatov

GRUOJ

Al mi iame ŝajnas, ke soldatoj,
ne revenintaj post la kuglobru',
ne estis en la teron forsendataj,
sed ĉiu iĝis neĝeblanka gru'.]

Jen flugas laca aro dum vespero,
sed eta diso eĉ ne kaŝas sin.
Kaj penso ekdensiĝas de l'aero:
ĉu jen la loko por akcepti min?

Kaj tago venos, kiam mi konstante
fluganta estos same en vesper',
el la nebul' birdlingve revokante
vin ĉiujn, kiujn lasis sur la ter'.

El la rusa: Andreo Jakovlev

*V. Glazunov
Voroneĵ, USSR*

LA BELULINO AJSULU

Se vi opinias, ke la ebena regiono,
kiu etendiĝas oriente de Aralmaro,
estas enuiga, glata kiel tablo kaj ĉie
egala dezerto, vi eraras. Tiel mi opi-
niis iam, lerninte el la avaraj linioj de
geografia lernolibro. Sed kiam mi
ekvidis tiun ĉi regionon per miaj
propraj okuloj, tuj mi ŝanĝis mian
opinion. Efektive, post ĉiu variaĵo
de la reliefo vin atendas surprizo:
jen subite vi venas al lageto, sur kies

antaŭ miaj okuloj. . . Malantaŭ la
ĉerko blondas la ora kapo de ŝia filo,
inter du nigre vestitaj patrinoj. La
vizaĝo de panjo estas deformita pro
sufero kaj kvazaŭ krias: „Miĉe, dolĉa
mia infano, pardonu min! Mi neniam
forĝesos vin!“

TESTAMENTO DE BRAVULO

Bulgara popola kanto

Multajn tagojn havas unu jaro —
tiom multajn urbojn mi vizitis!
Min nenie, panjo, malsan' trafis,
hejmen venis mi kaj . . . malsaniĝis.
Mi malsanas, panjo, kaj mi mortos.
Ne ĉagrenas mi, ke juna mortos,
sed ĉagrenas mi pri la ĉevalo.
Ĉeval' brava! Kiu pri ĝi zorgos?
Ĉu ci, panjo, ci estas maljuna!
Ĉu fratino? Ja ŝi estas juna!
Zorgos fratin' pri bravul' alia.
Kiam mortos mi, juna bravulo,
enterigu min ĉe la krucvojo,
ĉe krucvojo standardon starigu,
al standardo ligu la ĉevalon,
ke, henante, ĉeval' min priploru,
min — Bogdanon, la grandan bravulon!
Kiam pasos lu bravul' inda,
li surrajdu la bravan ĉevalon,
flirtigante la verdan standardon,
min menciuj per jenaj paroloj:
„Gloru estu Bogdan la bravulo,
kiu rajdis la bravan ĉevalon.
flirtigadis la verdan standardon!“

El la bulgara: Simeon Hesapĉiev

bordoj staras tiel densa kaj alta ka-
naro, ke kamelo povas sin kaŝi tie,
jen vi ekvidas ruinon de antikva
„mazaro“ (maŭzoleo), tra kies fendoj
kuradas ŝtele sovaĝaj katoj, jen ape-
ras antaŭ vi malalta veprejo, kaj le-
poroj eksaltas el inter viaj piedoj aŭ
buntaj fazankokoj kiel sagoj ekflu-
gas supren. Neniam vi povas scii,
kio atendas vin sur via vojo. Kaj eĉ
kiam vi vidas malproksime la tre-

mantan linion de la horizonto, kiam vin ĉirkaŭas nur tute ebena stepo, vi trovas mirindan ĉarmon en tiu ĉi majesta, virga vastaĵo.

Estis tre frua mateno. Nur iomete ekheliĝis oriente la plej malsupra rando de la firmamento. Ankoraŭ steloj brilis en la preskaŭ nigra veluro de la ĉielo. Nenia bloveto en la tre freŝa aero de la frua aŭtuno. Niaj ĉevaloj trotetis sur la apenaŭ videbla stepa vojo. Ni estis du: la juna kazaĥa poeto Ĵuká kaj mi. Longan tempon ni rajdis silente, ĉiu laŭ sia maniero perceptante la ĉirkaŭan mondon. Sed kiam la nuancoj de la ruĝo kolorigis la ĉielon kaj ĝi ekflamis en sunoro, ni ne plu povis resti silentaj. Ĵuka ekkantis, kvazaŭ salutante la aŭroron, poste sin turnis al mi, kaj ni vigle ekparolis.

— Ĉu vi vidas la monteton tie maldekstre? — li demandis.

Mi rimarkis izolitan altaĵeton kun hirtaj gramenaj herboj, kaj tuj mi kapjesis, interesiginte.

— Tie, laŭ la popolaj legendoj, vivis la saĝa belulino Ajsulu, — li daŭrigis.

Kelkfoje jam mi aŭdis tiun nomon citatan en plej diversaj legendoj kaj fabeloj. Mi sciis, ke ŝi estis tre bela kaj sprita junulino, kiu ofte heroece servis al sia popolo.

Mi instigis per kalkanumoj mian ĉevalon kaj sekvis mian amikon. Iom flankiĝinte de nia vojo, ni facile ekgalopis al la monteto.

La suno jam plene brilis. Antaŭ ni vidiĝis senlima ebenaĵo, sur kiu jen tie jen ĉi tie leviĝis similaj montetoj, kaj tre malproksime ĉe la horizonto, apenaŭ rimarkebla en la blua nebuleto de la spaco, etendiĝis iu malalta montaro.

Ni sidiĝis rekte sur la sabloriĉan teron. La ĉevaloj staris senmove, metinte la kapojn unu sur la kolon de la alia.

— La legendo diras, — komencis la poeto, — ke en tre malproksima tempo en tiu ĉi lando regis severa kaj

kruela ĥano. Ofte li havis strangajn kapricojn kaj neplenumoblajn dezirojn, pro kiuj liaj regatoj ege suferis. Unufoje la ĥano proponis al sia popolo trovi ĝustajn respondojn al du demandoj: kio estas la plej firma en la mondo, kaj kio estas la plej dolĉa en la mondo. Ĉu vi konas tiun ĉi legendon?

— Ne, — mi respondis, — tiun ĉi mi ne aŭdis.

— Do, — daŭrigis mia amiko, — la ĥano promesis al la diveninto riĉan premion kaj mortpunon al tiu, kiu fiaskus. Tiel multaj homoj perdis siajn kapojn. Plej diversaj estis la solvoj, proponataj al la ĥano: fero, ŝtalo, ŝtono, sukero, mielo, venko. Sed nenio povis kontentigi lin.

Kaj jen la filino de la malriĉa paŝtisto, tre bela knabino, nomata Ajsulu, deklaris al sia patro, ke ŝi povas respondi al la demandoj de la ĥano.

„Vi iru, — ŝi diris, — kaj anoncu al lia ĥana moŝto, ke la plej firma en la mondo estas la hufo de lia ĉevalo. Diru nur tiun ĉi unu respondon!“

Miris la paŝtisto, sed obeis la filinon, ĉar ekde infaneco ŝi ĉiam distingiĝis per siaj sprito kaj saĝo. Li iris al la ĥano kaj humile diris al li la respondon de Ajsulu. La ĥano treege koleriĝis pro la impertinento de la mizera paŝtisto. Grandaj moŝtuloj, grandaj riĉuloj kaj saĝuloj perdis siajn kapojn, kaj jen simpla paŝtisto kuraĝis superi ilin! Plore ĵuris la paŝtisto:

„Ne estas mi, kiu tiel divenis. Tiel diris mia kompatinda filino.“

La ĥano ekinteresiĝis kaj tuj ordonis venigi al li la paŝtistan filinon.

„Ĉu vi elpensis la respondojn al miaj demandoj?“ — li demandis ŝin.

„Jes, via ĥana moŝto“, — kuraĝe respondis Ajsulu.

„Sed kial la hufo de mia ĉevalo estas la plej firma en la mondo?“ — li insistis.

„Tre multaj ĉevaloj pasas preter nia jurto, via ĥana moŝto, sed ne-

niam la tero tremas sub iliaj hufoj. Nur kiam via batalĉevalo preteriras, ĉirkaŭe tremas la tero.“

La respondo plaĉis al la ambicia reganto, ankaŭ plaĉis al li la kuraĝa belulino mem.

„Nu, diru nun, kio estas la plej dolĉa en la mondo“, — postulis li.

La knabino rekte alrigardis la ĥanon kaj tiel respondis, dum ŝiaj vangoj iom ruĝiĝis:

„Evidente, mia sinjoro, la plej dolĉa estas la kunesto de la geedzoj.“

La ĥano kun granda surpriziĝo kaj pasio ekrigardis la junan belulinon:

„Kiamaniere vi scias tion? Vi ja estas virgulinino!“

„Malmulte mi devis pensi, via ĥana moŝto, por tion diveni, — respondis la junulinino. — Miaj gepatroj amegis min. Nokte mi ĉiam kuŝis inter ili, kaj ili varme karesis min. Ho, kiomfoje mi aŭdis ilin diri, ke mi estas la plej dolĉa en la tuta mondo! Sed matene tre ofte mi vekiĝis jen ĉe la unu, jen ĉe la alia flanko de la gepatroj, dum ili estis kune. Certē mi estis dolĉa por ili, tre dolĉa, tamen videble ili trovis pli dolĉa esti kune. Tial do mi konjektis, ke tiu kunesto estas io plej dolĉa en la mondo.“

Ankoraŭ pli multe plaĉis al la ĥano tia sprita respondo. Li ekamis la belulinon kaj volis edziĝi al ŝi.

„Kiun edziĝpagon vi volas? — li demandis la patron. — Mi ĉion donos, por ke via filino estu mia edzino.“

„Permesu, granda ĥano, pripensi tion“, — petis la feliĉa patro.

La ĥano adiaŭis lin kaj la filinon, permesis pripensi kaj fiksis la tempon je du tagoj.

...Juka interrompis sian rakonton kaj diris:

— Ĉi tie proksime estas melonkampo, kiun gardas la maljuna Ĝolĉi. Mi iomete konas lin. Do kion vi pensas pri aroma kaj dolĉa melono, he?

Mi diris, kion mi pensis. . . Tuj ni saltis sur niajn selojn kaj ektrotis al la melonkampo.

Ĉe rando de la plantejo, malfacile distingebla inter arbustoj, staris gardista kabaneto. Proksimiĝante ni subite aŭdis kantadon.

— S-s-st! — Juka siblis, metante fingron sur la buŝon. — Ajsulu kantas. Si ja kantas mian versaĵon!

Ni haltis, senbrue forlasis la selojn kaj ŝtele iris al la malantaŭa flanko de la kabano. Post ĉiu paŝo pli kaj pli klare aŭdiĝis bela juna voĉo. La profunde lirika melodio kaptis min. Mi retenis mian amikon kaj demande ekrigardis lin. Li flustris en mian orelon, tradukante:

Venu, venu, mia karulo,
mi deziras vin.
Venu, venu, mia belulo,
mi amegas vin.
Venu, venu, mia saĝulo,
mi bezonas vin.
Venu, venu, mia bravulo,
mi honoros vin.
Venu, venu, mia junulo,
mi kisos vin. . .

La junulinino kantis en sinforĝeso, kiel birdo en foliaro, kaj kiam la finaj sonoj de la kanto kvazaŭ ĝeme degelis, ni ekpaŝis al la pordo. En la malluma interno ekaŭdiĝis ia trema moviĝo. Sekvis ekkrio, en kiu mi kaptis notojn de surpriziĝo, hontemo kaj tamen de gastamo.

Mi ankaŭ eniris la kabanon kaj diris mian saluton, ankoraŭ tamen nenion vidante. Kiam post momento miaj okuloj akomodigis al la duonlumo, mi ekvidis junulinon sidantan sur kuseno. Plektitaj haroj, akurate pendantaj ambaŭflanke de la kapo, kadris simpatian brunetan vizaĝon kun nigraj, larĝe malfermitaj okuloj kaj klasike arkaj brovoj. Sur ŝiaj diketaj, duone malfermitaj lipoj apenaŭ vidiĝis rideto, pri kiu tamen atestis vico de perlosimilaj dentoj.

— Ni volis trovi la avon Ĝolĉi, — diris Juka en rusa lingo, iamaniere diveninte, ke ŝi komprenas ĝin.

— Li forveturis al la vilaĝo, — ŝi respondis tute korekte kaj kun malkaŝe radiant aĉarma rideto.

— Mi vidas, ke tiel estas, — daŭri-

gis Ĵuka en stranga konfuzo.

— Ĉu vi nepre bezonas lin? — ŝi demandis.

Nun mia amiko tute kuraĝe kaj malkaŝe respondis kun gaja rido:

— Ho, ne! Ni estas logitaj de la melonoj. . . Kaj de via kanto!

Tuj ruĝo aperis sur la vangoj de la knabino, kaj ŝi rapide kaŝis sian vizagon per manplatoj.

— Ho, kiomfoje mi admonis min mem ne kanti kie ajn krom en mia propra hejmo!

— Tiam oni ne havus la plezuron aŭskulti vin, — mi aldonis.

Rapide la belulino surmetis ŝuojn sur siajn malgrandajn bronzkolorajn piedojn kaj forkuris el la kabano.

— Almenaŭ mi regalu vin per melono! — ŝi diris jam eksterporde.

Post mallonga tempo ŝi revenis, portante bone maturiĝintan melonon kun nepriskribebla aromo. Ŝi lerte distranĉis ĝin je longaj pecoj kaj metis ilin antaŭ nin sur rondforma ligna plado.

Fine ni prezentis nin ĝentile. Ŝi denove ruĝiĝis kaj, ekrigardinte mian amikon, mallaŭte diris:

— Mi konas vin, pli ĝuste viajn versojn.

Ĵuka modeste silentis, sed ŝi tuj daŭrigis:

— Bonvolu manĝi la melonon, estimataj gastoj. La plej dolĉa en la mondo! Kaj mi prizorgos miajn kaprinojn.

Dirinte tion, ŝi malaperis en unu momento.

Ni signifoplene ekrigardis unu la alian. Ĵuka apenaŭ tuŝis sukplenan pecon de la melono, tuj leviĝis kaj ankaŭ fulme elkuris tra la pordo. Mi restis ene, sidante kun fleksitaj kruroj kaj meditante kiel orienta profeto. Ĉi tie mi povis nur observi kaj mediti. . . Tamen mi baldaŭ enuiĝis, ĉar mia pacienco tute ne estis tiu de orienta pensulo. Manĝinte kun granda plezuro decan porcion de la melono, mi ekstaris, rigardetis tra la pordo kaj, neniun vidinte, senbrue

paŝis for de la kabano.

En la helega sunlumo vidiĝis nur la velkanta verdaĵo de la kampo. Tamen baldaŭ mi kaptis apenaŭ aŭdeblajn voĉojn, sendube iliajn voĉojn, el iom distanca ravineto. Precipe li parolis, dum ŝi nur de tempo al tempo aligis siajn sonorajn replikojn. Mi faris kelkajn paŝojn al ili kaj tiam subite sciigis, ke Ĵuka deklamas kun profunda emocio. Estiĝis tute klare, ke mi ne devas malhelpi tiun ĉi spontan eksplodon de sentoj.

Ne longe tio daŭris. Kvazaŭ en bone lernita teatraĵo ili atingis iun rimarkon en siaj roloj kaj tuj ambaŭ gaje ekridis, dirante jam, kiel mi komprenis, ordinariajn, prozajn vortojn. Mi konjektis, ke li rekompencis la misteran „Ajsulu“ por ŝia kanto.

Ili estis revenintaj, kaj Ĵuka alvokis min.

— Ĉi tie mi recitis miajn poeziaĵojn antaŭ Ajsulu, — li diris.

— Mi ne estas Ajsulu! — rimarkis la knabino kun ŝerca tono. — Mia nomo estas Ajŝa.

— Ne gravas, Ajŝa, karulino, — rediris Ĵuka, — mi rekonis en vi Ajsulu.

La suna inundo, venanta el la altega, serene blua ĉielo, dronigis la stepon. Tamen la ne tro varma aero ĝis nun estis senmova kaj kristale pura. Estis jam tempo por daŭrigi nian rajdadon. Ajŝa alportis al ni kruĉojn da bongusta kumiso. Ni ĝuis la refreŝigan trinkaĵon, diris al ŝi dankajn vortojn kaj estis pretaj forlasi la gastaman mastrinon. Sed mi rimarkis, ke Ĵuka serĉas motivon prokrasti. Li ree forsaltis de la ĉevalo, senbezzone tiris kaj pinĉis la selrimenojn, karese frapetis la kolon de l'animalo kaj senĉese parolis ion al la knabino, kiu volonte respondis al li mallaŭte. Videble ekscitita, ŝi skrapis la grundon per pinto de sia ŝuo.

Fine ni adiaŭis ŝin kaj fortrotis. Post mallonga silento Ĵuka diris:

— Antaŭ kelkaj tagoj ŝi iĝis stu-



dentino en la universitato de nia ĉefurbo.

Liaj okuloj ekbrilis, li subite sin streĉis en la selo, ekrigardis malantaŭen kaj aldonis:

— Ĉu vi kredas, amiko, mi ja vere ekamis ŝin?

— Do kiun edziĝopagon vi donos por via Ajsulu? — mi ŝerce demandis.

— Ha, — li vigliĝis, — vi memorigis min pri la fino de mia rakonto. Do jen. La paŝtisto tiam sin turnis al sia saĝa filino:

„Pri kio do mi petu la ĥanon?“

La junulino tre amuzis sian popolon kaj decidis liberigi lin de la ĥana despotismo. Ŝi trovis, ke por tio necesas forpreni lian riĉaĵon kaj disdoni ĝin al la popolo. Pro tio certe la ĥano fariĝus ordinara homo kaj nepre mildiĝus. Tiam ŝi povus ekami lin kaj esti lia edzino. Ŝi donis al sia patro malgrandan strangan saketon kaj diris:

„Prenu tiun ĉi saketon, paĉjo, kaj petu la ĥanon plenigi ĝin per oro.“

Miris la patro, sed faris kiel lia infano petis. Ankaŭ la ĥano ekmiris:

„Tiel malmulte vi deziras? Do bone, mi plenigos vian saketon.“

Sed kiom ajn la ĥano ŝutis la oron, la saketo ĉiam restis malplena. Unu trezorejo estis elĉerpita, la alia ankaŭ konsumiĝis, la tuta ĥana havaĵo malaperis en la saketo, ĝi tamen ne estis plena.

Nadia Andrianova

„Kia estas via saketo?“ — ekkriis la ĥano, turnante sin al Ajsulu.

„Sufiĉas, mia sinjoro, — respondis la juna saĝulino, — ĝi estas neplenigebla.“

„Pro kio?“ — ankoraŭ pli multe mirigis la regnestro, tamen fidela al sia promeso doni ĉion por esti edzo de la belulino.

„Ĝi ne estas simpla saketo, sinjoro mia, — trankvile klarigis Ajsulu, — ĝi estas. . . okulo homa.“

Tiel la kruela ĥano perdis sian tutan riĉaĵon kaj mildiĝis, la popolo libere ekspiris, kaj multaj malriĉuloj ricevis bonan subtenon. Ajsulu fariĝis edzino de la ĥano, ĉar li, nun simpla ordinarulo, fariĝis tre bona homo, kaj la vira beleco neniam mankis al li.

Mi dankis mian amikon pro la rakonto kaj diris al li:

— Mi vidas, ke vi volas plenigi vian „saketon“ per la amo de Aĵŝa. . .

— Jes! — Juka laŭte ekkriis. — Mi sentas, ke mi amas ŝin senlime!

Ni rajdis malrapide. La suno jam ektuŝis la linion de la horizonto. La skarlata rondo iom post iom kaŝis sin en la fantaziaj kurtenoj de la nuboj. Mi ekrigardis malantaŭen al la krepuska stepo. Tie, malproksime, estis saĝa, bela kaj reala Ajsulu. Mi kredis, ke ŝi estos feliĉa, ĉar ŝi nepre scias, kio estas la plej dolĉa en la mondo. . .

TRISTA MELODIO

Al Nikola Aleksiev

Forflugas jaroj. Mi oldiĝas . . .
Sed eble nun, eĉ pli profunde
ol iam, kredas iufoje:
jen morgaŭ, kiam mi vekigōs,
ekvidos mi min same juna,
kiel delonge, kaj mirakle
la jaroj vere ripetigōs
kaj brilradios mondo suna.
Ho revoj, revoj . . . En real'
ne eviteblas vivaŭtuno. . .
Verŝajne iros mi ĝis fino,
sed tamen dubas pri l' destino,
ne povas kredi leĝon ĉi:
sur griza tero ĉio restos

en mondo bela — signoj estas! —
kaj morgaŭ brilos sunĉielo
kaj hela tag', kiel fabelo,
super planedo birdoj nestos . . .
Sed ripetigōs tio ĉi —
nur ne por mi, jes, ne por mi . . .
Kaj tiel mi foriros poreterne,
ne ĝisvivinte, ne ĝisaminte,
ne ĝisverkinte
la plej ĉefan verkon,
pri kiu revis mi dum tuta vivo.
Jen kia trista perspektivo. . .
Pro tio ĉi —
melankolia elegi' . . .

PRELEGO

Ni ne atentis pri longa prelego,
eĉ se rezulto de granda penego. . .
Kaj se ĝi estus eĉ note skribita,
same atento de l'homoj forglitas.
Iu kaŝite romanon eklegas,
dua figuron amuzan desegnas.

Dormas aveto en varma angulo.
Ŝvebas la vortoj en onda nebulo.
Tute subite romano brufalas.
La desegnanto timtreme ekstaras.
Saltas vekite el dormo la avo. ♫
Ve, jam finiĝis prelego-dormado. ♪

NI RECENZAS

INTERESA BIOGRAFIA VERKO

Lastatempe en la plej renoma bulgara eldonejo „Partizdat“ aperis la beletra biografio „Mi amas la verdecon de mia patruj-angulo“ (naskiĝregiono). Aŭtoro de tiu verko estas la konata E-verkisto Ĥristo Gorov. La libro pentras antaŭ la okuloj de la legantoj la panoramon de la vivo de bulgara laborista e-isto Metaksa Guginski.

Persekutata de la bulgaraj faŝistoj pro sia revolucia agado inter la soldatoj de la cara armeo, arestita en la kazerno, M. Guginski estis destinita al mortkondamno. Tamen alia soldato, lia bona amiko, postenanta nokte antaŭ la arestejo, proponis al li kune forkuri kaj elmigri. Post longa vagado tra Greklando kaj Turkio la junaj homoj sukcesis atingi Sovetunion. Oni akceptis ilin frate kaj prezentis al ambaŭ eblecon absolvi la Komunistan Universitaton por Politikaj Elmigrintoj.

Venis tamen la faŝista puĉo en Hispanio en 1936 kontraŭ la starigita rezulte de balotoj juna respubliko. La hispanaj patriotoj povis per propraj fortoj kontraŭbatali la puĉistojn kaj defendi sian demokratian respublikon. Tamen la italaj kaj la germanaj faŝistoj kuris helpe al sia agento Franko por frakasi la kreitan surbaze de popola unuecfroonto respublikon. Ili sendis siajn armetrupojn, riĉe ekipitajn per tankoj, aviadiloj kaj ĉiuspeca moderna armilaro. Ĉe tiuj cirkonstancoj la hispana respublika registaro apelaciis al ĉiuj demokratiaj fortoj en eksterlando subteni la batalon kontraŭ la faŝistaj puĉistoj kaj ties eksteraj aliancanoj.

Malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj, kreataj intence de „demokratia“ Eŭropo, abnegaciaj filoj de multaj popoloj el Eŭropo kaj Ameriko direktiĝis al Hispanio. Ili formis volontulajn militunuojn nomatajn „internaciaj brigadoj“, kiuj heroe batalis ŝultro ĉe ŝultro kun la militunuoj de la respublika armeo kontraŭ la faŝistaj puĉistoj.

Inter la brigadanoj troviĝis centoj pa

bulgaraj revoluciuloj, kiuj konis laŭ propra amara sperto, kion portas la faŝista reĝimo al la laboristoj, kamparanoj kaj progresemaj intelektuloj. Ankaŭ e-istoj eldiversaj landoj partoprenis la vicojn de la interbrigadanoj.

En sia beletra biografio de Metaksa Guginski, bazita strikte sur historiaj dokumentoj, Ĥristo Gorov montris en lia persono tre simpatian laboristan e-iston. Guginski praktike aplikadis la proletan internacismon kaj per la ofero de sia vivo luktis heroe sur hispana teritorio kontraŭ la malamiko de ĉiuj popoloj — la faŝismo de Hitler, Musolini kaj Franko. Tiamaniere Guginski batalis kontraŭ la preparantoj de agresa monda milito, kiu ne malfruis komenci preskaŭ tuj post la frakaso de respublika Hispanio.

El la libro de Gorov ni ekscias, ke Guginski ne estis la sola e-isto inter la brigadanoj. Tie troviĝis ankaŭ lia amiko — la kudrista laboristo Kosta Penev. Penev estis tre simpatia inteligenta laboristo. Mi konis kaj ege ŝatis lin pro lia senlima preteco sinoferi por la intereso de la laborista klaso. Kiel proleta e-isto Penev partoprenis aktive la vivon de la laborista E-societo en Sofio kaj estis respondeculo antaŭ la faŝista cenzuro pri eldonaĵoj de Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA). En la armita duelo kun la faŝistoj li ree montriĝis sentima bravulo. Ĉiam sur la unua batalinio en Hispanio, li estis peze vundita de faŝista ŝrapnelo kaj forpasis. En la 12a interbrigado, kie servis Guginski, ankaŭ lia ĉefo estis e-isto — la hungaro Rezső Szanto-Baler, doktoro de juro, alte kvalifikita artileriisto. Ambaŭ bonege interkompreniĝis kaj decidis utiligi E-on por propagandi la legitiman batalon de la hispanaj patriotoj kontraŭ la frankistoj. Tiucele ili komencis publikigi E-bultenon „Popola Ffronto“, en kiu kunlaboradis ankaŭ la hungara pentristo Zoltan Waly (Vali). Tiu bulteno atingis la manojn de progresemaj e-istoj en aliaj



landoj, ankaŭ en Bulgario. Ni arde propagandis la justan aferon de respublika Hispanio, utiligante ankaŭ la E-an hirundon „Popola Fronto“. Iun tagon en dispono de la artileria trupo „Thälmann“ (Telman) venis germana majoro-antifaŝisto. Rezső Szanto ekkonis en li la faman verkiston Ludwig Renn, konata kiel aŭtoro de kontraŭmilita romano kaj revolucia poeto. Renn verkis ankaŭ en E-o. Zoltan Waly estis lia konatulo kaj ili interŝanĝis kelkajn frazojn en E-to. Renn, kiu havis la famon de sperta artileria oficiro kaj bonega milita specialisto, donis al Guginski en E-o valorajn militajn konsilojn.

Ni povas esti dankaj al Ĥristo Gorov, ke li ne preterlasis ankaŭ la „esperantistajn“ momentojn el la vivo de Guginski. Sukcesinte reatingi Sovetunion post kelkjara abnegacia lukto en Hispanio, Guginski dum la jaroj de la Dua Mondmilito revenis kiel paraŝutisto en sian patrolandon kaj kun fidelaj amikoj sukcesis atingi Rodopi-montaron. Li fieris antaŭ siaj kamaradoj pri la natura beleco de tiu landoparto, kie li naskiĝis kaj kreskis. „Mi amas la verdecon de mia naskiĝangulo“ estis lia amata esprimo. Faŝistaj persekutantoj tamen hazarde malkovris la spurojn de la venintoj el Moskvo paraŝutistoj antaŭ ol ili sukcesis ligi kun la partizanaj taĉmenoj. Guginski kaj liaj kamaradoj estis mortigitaj surloke. Nun tie staras monumento dediĉe al la sinifero de tiuj popolaj bravuloj. ■

La verko de Ĥristo Gorov estas literatura monumento de Guginski. Oni legas ĝin preskaŭ kiel romanon, ĉar la aŭtoro ne kaŝas sian simpatian al la heroo kaj per vortoj, elirantaj el la koro, pentras la plej gravajn momentojn de lia vivo kaj agado. Gorov mem estis partizano en Rodopi-montaro kaj sukcesis prezenti la vivon de la paraŝutistoj tiel verve kaj aŭtentike, kvazaŭ li mem akompanis ilin tra la verdaj rodopaj arbaroj. En lia lingvaĵo oni trovas ankaŭ vortojn el tiu lingvoregiono. Li pentras tre bone kiel la simplajn homojn de Rodopi-montaro, tiel ankaŭ la portretojn de la faŝistaj ĉefoj, organizantaj la ekstermon de la partizanoj kaj de ĉiuj kontraŭfaŝistoj batalantaj por liberigo de nia patrujo el sub la kruela faŝista diktaturo.

Kiel e-isto el la epoko de BuLEA mi estis aparte fiera tra legi la paĝojn, kie la aŭtoro donas informojn pri la esperantisteco de Guginski, Kosta Penev, Ludwig Renn kaj la hungaraj kontraŭfaŝistoj Szanto kaj Valy. La politik-eduka laboro de BuLEA donis riĉajn fruktojn, inter kiuj estis ankaŭ la laboristaj e-istoj Guginski kaj Penev, sekvitaj de preskaŭ cent kvindek herooj — e-istoj, pereintaj por la popola libero. Mi arde rekomendas al la legantoj de „BE“ la libron de Gorov sub la poeziplena titolo „Mi amas la verdecon de mia naskiĝangulo“.

Nikola Aleksiev

[PRI LA E-GRAMATIKO DE V. OLJANOV]

Pro la konstante kreskanta nombro de personoj, lernantaj la Internacian Lingvon, dum la lastaj jaroj ĉe ni estas akre sentata bezono de instruhelpiloj. Tial oni tre bone renkontis la eldonitan en 1966 E-gramatikon de Violin Oljanov kaj Kunĉo Vălev, kiu baldaŭ entute elĉerpiĝis. Post la akcepto de nova instruprogramo kaj transiro al tri-grada instruado de E-o la bezono de science sistemitaj gramatiko estiĝis aparte akra.

La aperinta fine de 1978 E-gramatiko de V. Oljanov inkludas, krom la tri bazaj partoj: fonetiko, morfologio kaj sintakso, ankaŭ demandojn pri leksiko kaj vortfarado, kvankam tiuj lastaj ne estas prezentitaj aparte. Tio estas tute normala, se oni konsideras, ke en E-o la vortfarado estas reglamentita per severaj reguloj kaj organike kunligiĝas kun la morfologio. En la fonetiko la aŭtoro turnas seriozan atenton precipe al la regula kaj modela prononcado de la fonemoj mankantaj en la bulgara lingvo, kiel ankaŭ al tiuj, kiuj estas diverse prononcataj en la eŭropaj ĉeflingvoj.

Fundamentan parton de la gramatiko de

Oljanov prezentas la morfologio. En ĝi l pritraktas ĉiujn morfologiajn kategoriojn en ilia praktika apliko kaj ankaŭ, kiel jam menciite, la vorfaradon kun ĉiuj ĝiaj leksikologiaj unuoj. En la sintakso koncize kaj en tre populara formo li tuŝas la bazajn demandojn pri la E-a frazokonstruo. La aŭtoro ĉiam sin gvidas de konsideroj pri la praktika apliko de la sintaksaj reguloj kaj emfazas tiujn demandojn, kiuj havas plej grandan signifon por la regula uzado de la lingvo. Tial li direktas atenton al la interligoj en la malsimpla frazo, speciale al la subpropozicio, kie oni plej ofte eraras. Li destinas pli da loko ankaŭ al la uzado de la participoj, iuj formoj de kiuj mankas en la bulgara lingvo, kaj aparte al la gerundioj (participaj adverboj), kiujn oni asimilas plej malfacile.

Malgraŭ ke en komparo kun la antaŭa la nuna gramatiko estas preskaŭ duone malgrandigita (laŭ paĝokvanto), ĝi tamen ampleksas ĉiujn ĉefajn demandojn de la E-gramatiko. Tio ne malpliigas la sciencan valoron de la verko, eĉ male, la aŭtoro tro-

* Violin Oljanov, *Esperanta gramatiko, eldonejo «Nauka i izkuvto», 1978, Sofio, p. 135.*

vis tre trafilas sintezon de multaj komplikaj demandoj, originale klarigas vicon da kategorioj, evitas nenaturajn komplikaĵojn ktp.

Krom scienca la verko posedas ankaŭ alian valoran kvaliton: formon kompreneblan por ĉiuj pro sia populara stilo. Ĉiu gramatika formo estas klarigita tiel, ke ankaŭ personoj ne posedantaj bone la bulgaran gramatikon aŭ ne spertaj pri gramatikaj nocioj, povas facile asimili la materialon. Kelkfoje la aŭtoro serĉas ekvivalentojn en la bulgara lingvo, substrekas tiujn formojn kaj ties uzadon, kiuj konsiderinde diferencas de la nacia lingvo aŭ tute mankas en ĝi (ekzemple:

la predikatajn participformojn, la uzadon de la difina artikolo, la uzadon de demandaj kaj relativaj pronomoj). Ĉi ĉiu kategorio kaj gramatika regulo estas donitaj sufiĉe da ekzemploj kaj klarigoj pri ties uzado. La libro estas verkita bulgaringve kaj tio aparte faciligas la bulgarajn e-istojn.

En tiu sia formo la „Esperanta Gramatiko“ de V. Oljnov bone plenumos sian distinon — servi kiel instruhelpilo por kursanoj de la superaj gradoj, kaj kiel ĉamana konsultilo por instruantoj, literaturistoj, tradukistoj kaj por ĉiuj, kiuj deziras perfektigi en E-o.

TRA LA GAZETARO

J. „Iskra“, u. Kazanlâk (1. I. 1979): salutvortoj de la estraro de la loka E-societo „Roza Valo“ al la loĝantoj de la urbo okaze de la Nova Jaro.

En la sama ĵurnalo (22. 6.): artikolo de Spasov „Amikoj el tuta mondo. „Roza Valo“ 75-jara.“ Dukolumna, detale priskribas la fruktodonan agadon de la societo.

J. „Ĉerveno Zname“, u. Vidin (2. I.): informo de V. Dokova pri fondo de junulara grupo ĉe la loka E-societo „Espero“.

J. „Rabotniĉesko Delo“, Sofio (4. 1.): korespondaĵo pri la artaj programoj de la horo de Popola Legejo „Napredâk“ en u. Târgoviște. Detale pri ĝia partopreno en la belarta programo de la 63a UK de E-o en Varno.

En la sama ĵurnalo (14.5.): sub titolo „Esperanto — lingvo de la amikeco“ — detala materialo de la oficiala korespondantino de la ĵurnalo pri la agado de E-societo „Nova Vojo“ en u. Pernik.

En la sama ĵurnalo (10.6.): informo pri la nacia seminario de la Bulgara MEM-Komitato en u. Polski Trâmbeŝ.

En la sama ĵurnalo (29. 6.): informo pri la honorigo de Nikola Aleksiev per la alta ŝtata distingo „Heroo de la Ŝocialisma Laboro“ kun mencio pri lia E-agado.

J. „Dimitrovsko Zname“, u. Pernik (5.1): sub titolo „La homaj rajtoj kaj Esperanto“ — korespondaĵo pri la aktivecoj de E-societo „Nova Vojo“ lige kun la datreveno de la Deklaracio de UNO pri la Homaj Rajtoj.

J. „Naroden Drugar“, u. Jambol (8.2.): detala korespondaĵo de Dimo Trudoljubov pri la nacia renkontiĝo de la mezlernejaj e-istoj en u. Jambol la 2—3an de februaro.

J. „Trevnenski Zov“, u. Trjavna (14.2.): informo pri malfermita kurso de E-o, gvidata de Ivan Gâmzov.

J. „Oteĉestven Zov“, u. Vraca (20.2): artikolo „Amikeco trans limoj“ de Bojĉo Mladenov lige kun la Semajno de Internacia

Amikeco.

J. „Ŝumenska Zarja“, u. Sumen (27.2): informo de Cvjatkio Todorov pri renkontiĝo de ŝumenaj e-istoj kun la prezidanto de la DK de la Paco Angel Videnov.

En la sama ĵurnalo (9.6.): informo pri partopreno de infanoj el u. Sumen en ekspozicioj de infanpentraĵoj en Barcelona (Hispanio), Göteborg (Svedio) kaj Tiĥvinj (USSR). La sendo de la pentraĵoj (multaj el ili premiitaj) estas iniciatita de e-istoj.

J. „Zarja na Komunizma“, u. Loveĉ (16.3): artikolo „Ĉu estas ebla komuna lingvo“ de ladjoktoro de filologiaj sciencoj prof. Mahomet Isaev, prezidanto de la Asocio de Sovetaj E-istoj, enhavanta gravan pledon por E-o. La tradukon el la soveta semajna gazeto „Nedelja“ faris Ilija Ivanov.

J. „Veĉerni Novini“, Sofio (7.5): informo de Bulgara Telegrafa Agentejo pri renkontiĝo de gvidaj personoj de la E-asocioj de Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, USSR kaj Vjetnamio, okazinta en u. Viŝegrad, Hungario.

J. „Sofijska Pravda“ Sofio (10.4): artikolo „Amikeco signifas priateljstvo“ de Aleksandra Stefanova pri la agado de E-societo „Amikeco“ en u. Svoge.

J. „Oteĉestven Front“, Sofio (18.4.): artikolo de Marina Velkova „Dividita kulpo“ pri etika temo. Forta argumento por la eduka signifo de E-o surbaze de la sperto de la instruistino Maria Angelkova el u. Godeĉ.

En la sama ĵurnalo (1.5.): artikolo de Atanas Radionov „Infana E-Teatro“ — pri la Infana Teatra Studio ĉe la ŝtata dramteatro „Adriana Budevŝka“ en u. Burgas. La infanoj de la studio lernas E-on kaj preparas spektaklon en E-o „Fabelo por infanoj kaj plenaĝuloj“.

En „Nauka i Trud“, ĵurnalo de la Ŝtata Universitato „Kiril i Metodij“ en u. Veliko Târnovo (25.4.): informo pri la refondo de la studenta E-societo „Flamo“ ĉe la sama universitato kaj pri ĝiaj jam sukcesaj paŝoj.



Verdaj steloj

Simeon M. Simeonov

HIMNO DE L'INFANO

Ni infanoj bonaj estas —
idoj de l'homaro.
Ni kun granda ĝojo festas
dum la nuna jaro.
Ĉiuj kune, man' en mano,
kun packant' jubila
marŝas ni kun cel' humana
al estonto brila.
Kaj ni tre feliĉaj estas
en prosper' kaj sano,
gaje nian Jaron festas —
Jaron de l'Infano.
Estas ni generacio
de la estonteco,
kun spirit' internacia —
por pac' kaj justeco!
Ni lernadas kun espero,
ĉiam kaj sen laco.
Vivu sur la tuta tero
la eterna paco!



La feliĉa patrino Nikolina Viktorova, membro de E-societo „Georgi Stanev“ en Oriahovo, kun sia unuanaskito Mario

INFANECO MIA

Infaneco mia — birdo blanka,
ĉiun tagon flugas mi per vi.
En okuloj kun fajreroj dankaj
tra la naskaj kampoj kuras mi.

Kaj mi plukas ununuran floron.
Mia infanec' — ĝi estas vi.
Mi per vi ornamas la hararon,
en la revojn vin enplektas mi.

Infaneco mia — orlulilo,
plena je miraĵoj kaj fascino,
mi per vi saltetas kiel grilo.
Infanec', kunestu vi ĝis fin'!

*Joneta Trifonova, lernantino en
VI klaso, v. Burja, distrikto Gabrovo
El la bulgara: Dimitro Haĝiev*

PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ NASKITAJ EN JULIO KAJ AŬGUSTO

Pli bone cent jarojn honeste suferi, ol treti siajn honoron kaj kredon.
Por la patrujo ni laboras, frato, diru al mi miajn malperfektaĵojn, kaj mi al vi la viajn,
por ke ni korektu nin kaj ĉiam ni kune laboru, se ni estas homoj.

Tutkore ni devas ŝati tiun, kiu montras al ni niajn erarojn. Alikaze li ne estus nia amiko.

Vasil Levski (8. 7. 1837 — 6. 2. 1873)

Tie, kie ekzistas malobjektiveco, tie regas nepostulemo aŭ persona neŝato, tie neniam oni povas malkaŝi la veron.

Vasil Drumev (. . . 1838 — 10. 7. 1901)

Homo devas postuli maksimumon de si kaj malpli de la aliaj.

La paco estos sekurita, se ni firme kaj trankvile ekstaros por ĝi. Tiam ne ni ĝin, sed ĝi nin protektos.

Ilija Beŝkov (11. 7. 1901 — 23. 1. 1958)

Du aferoj forigas ĉiun malbonon: la tempo kaj la laboro.

Ĉiu homo laboras, faras ion; sed kiu nenion faras, tiu faras malbonon.

La virinaj larmoj fandas ĉion: kaj la glacieron, kaj la oron. . .

Mihalaki Georgiev (11. 8. 1854 — 14. 2. 1916)

Malicas nur tiuj, kiuj vivas nur kun la pasinteco, ĉar la pordoj de la estonteco estas fermitaj por ili.

Georgi Kirkov (15. 8. 1876 — 25. 8. 1919)

Elektis kaj tradukis: Stojan Kostadinov

FORPASIS JODDAN MARKOV

En monato junio niajn vicojn forlasis bonega E-aktivulo kaj homo — k-do Jordan Markov. Fidela filo de nia popolo, li kiel instruisto kaj sociaganto dum sia tuta vivo sindone kaj entuziasme laboris por ĝia klerigo kaj politika konsciigo, batalis por ĝia feliĉo.



Pli ol duonjarcenton k-do Markov laboris ankaŭ por la internacia lingvo E-o kiel organiza aganto kaj kursgidanto. Dum la lasta jardeko li estis senŝanĝa sekretario de la Instruista Sekcio de BEA, membro de la estraro de la Sofia Instruista E-societo „Diĉo Petrov“, unu el la organizantoj de la Someraj Internaciaj E-Kursoj en Burgas, kunaŭtoro de E-lernolibro ktp. Jordan Markov vere falis en la sulkon, plugante la verdan E-kampon.

Ĉiam vekis ĉe ni admiron lia forta amo kaj fideleco al E-o. Por E-o k-do Markov ne ŝparis tempon, fortojn, rimedojn. Ĉiujfoje li kun ardo kaj profunda sento de respondeco okupiĝis pri la komisiita tasko, plenumis ĝin ĝustatempe kaj bonkvalite. Al ĉiuj homoj li rilatis ĝentile, helpeme kaj ame.

Ni klinas la kapojn antaŭ la hela memoro de la malprofitema sociaganto kaj sindona e-isto, bona amiko kaj nobla homo Jordan Markov!

K. V.

(El p. 32)

J. „Zemedelsko Zname“, Sofio (6.6.): artikolo de la prezidanto de la Instruista Sekcio de BEA Vasil Bozarov — Heroo de la Socialisma Laboro, lige kun la diskutataj Tezoj pri la disvolvigo de la eduka sistemo en Bulgario. Forta pledo pri enkonduko de E-o en la unuecajn mezajn politechnikajn lernejojn.

J. „Borba“, u. Veliko Târnovo (12.6.): Informo pri la nacia seminario de la Bulgara MEM-Komitato en u. Polski Trâmbeŝ, pri

peresperanta ekspozicio kaj pri publika kunveno por la paco, organizita de la loka E-societo „Progreso“ kune kun aliaj neesperantistaj organizaĵoj.

Pri la samo informis ankaŭ J. „Podem“, u. Polski Trâmbeŝ (21.6.).

J. „Trud“, Sofio (30.6.): informo pri solenaĵo omaĝe al Nikola Aleksiev lige kun lia honorigo per la alta titolo „Heroo de la Socialisma Laboro“, organizita de la Centra Konsilio de la Profesiaj Unuiĝoj. Oni mencias ankaŭ lian E-agadon.

J. „Narodna Mladej“, Sofio (1.7.): sub titolo „La homo vivas“ — trikolumna intervjuo de Joto Krâstev kun Nikola Aleksiev lige kun lia honorigo kiel „Heroo de la Socialisma Laboro“.

deziras korespondi

Bulgario

Aĵanaska Naĉeva Caĉeva — str. Ĉrno More 11, 5500 Loveĉ (30-jara raŭlino — tutmonde)

D-ro Nedjalko Nedjalkov — blok 203, vĥod 4, II et., apart. 3, 5500 Loveĉ (literaturo, gram. diskaj, bk)

D-ro Tĵuran Omer — bloko 201, vĥod III, ap. 10, 5500 Loveĉ (fraŭlino, psikiatro).

Ĉeĥoslovakio

Jaroslav Kaŝparek — Vikova 30, ĈS — 130 00 Praha 3 (30-jara fervojisto — vivo de fervojistoj, bk)

GDR

Elfriede Hansen — Albert Höhnstr. 10, 943 Schwarzenberg (emerita instruistino — pri literaturo, historio)

Gerda Schreier — August Bebelstr. 158, 9433 Beierfeld (44-jara).

Hungario

Vajo Lajos — Levai ut. 33. VII. 68, H-2040 Budaörs (19-jara — kun bulgaraj gejunuloj pri naturo, vojaĝoj, junulara muziko ka.).

Andrea Kovacs — Mosoly 21. F, sz. 4, H-1131 (lernantino — kun lernantoj el la sesa klaso).

Kolombio

Fakuloj pri Publikaj Servoj de Elektroenergio, Akvo, Telefonsistemo interŝanĝas informojn pri tiuj publikservoj kun la tuta mondo. Adreso: Entreprenejoj Publikaj de Medellin, Esperanto, Planeacion, Ap. 940, Medellin, Kolombio.

